

INTERNACIA JURA REVUO



10

B·U·D·A·P·E·S·T

1959 no. 11

INTERNACIA JURA REVUO

ORGANO DE LA INTERNACIA ESPERANTO-ASOCIO DE JURISTOJ

IV. Jaro. ☆ N-ro 2 (10), 1969.

ENHAVO

	Paĝo
Genocido	
Prof. D-ro I. Lapenna (Wembley) — — —	2
Fundamento de la (Generala) Kriminala Punjuro de la Spaco	
D-ro St. Anagnostakis (Athine) — — — —	7
La Sociaj Tribunaloj en Germana Demokratia Respubliko	
D-ro K. Schulze (Berlin) — — — — —	10
Sociaj Tribunaloj en Hungario	
D-ro Gy. Ferencz (Budapest) — — — — —	13
Favora Kalkulo de la Dejortempo en Jugoslavio	
D-ro Dr. D. Russchitty (Tuzla)	17
La Parlamento en Hungarujo (I.)	
D-ro L. Márton (Budapest) — — — — —	18
Pri Kelkaj Pli Gravaj Praktikaj Problemoj Koncerne la Kriminalan Respondecon de la Kuracisto	
D-ro T. Valentini (Zalaegerszeg) — — — —	20
Bibliografio — — — — —	22
Fervojistaj Sindikatoj en Socialisma Respubliko Rumanujo	
J. Sirbu (Brasov) — — — — —	23
Kelkaj Demandoj de la Krimfarado de la Junaĝuloj en Soveta Unio	
G. M. Šilo (Barnaul) — — — — —	24
Glosaro — — — — —	25
Mallonge — — — — —	25
UN-Konferenco Pri la Juro de Traktatoj (II.) —	26
Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj — — —	28

Redaktoro:

D-ro Lajos Márton


Budapest 502. Pf. 13.

Lingva revizio: D-ro Jozefo Mátéffy

Feljelős kiadó: Dr. Mátéffy József.

500. Pest megyei Nyomda, Vác. 70-2068.

II-a Sekretario-Kasisto de IEAJ D-ro Lajos Márton



naskiĝis la 8-an de Novembro 1921, en Budapeŝt, Hungario. La studojn pri jur- kaj ŝtat-scienco li finis ĉe la Universitato de Budapeŝt. La temo de lia doktora disertacio estis: „La neŭtraleco”. La ŝtatan servon li komencis en jaro 1940 unue en ministerio por financoj, poste en ministerio por popolklerigo. Dum jaroj li laboris ĉe la Patriota Popolfronto. En jaro 1963

li fariĝis sekretario de Hungara Juristo-Asocio. Nuntempe li estas prokuroro en la Ĉefurba Ĉefprokurorejo.

En 1936 li lernis la Internacian Lingvon. En 1947 li estis elektita sekretario de Hungara Esperanto-Societo kaj en tiu funkcio li organizis la I-an Danubvalan Esperanto-Konferencon en 1948. Pri lia agado sur la internacia kampo estas menciinde: en 1952 li fariĝis ĝenerala sekretario de Sindikata Esperantista Asocio Tutmonda kaj ekde 1955 li funkcias en la internacia organizo de MEM. Post la periodo de granda silento li estis unu el la reorganizantoj de la hungara Esperanto-movado kaj fondintoj de Hungara Esperanto-Konsilantaro kaj li estis elektita ties ĝenerala sekretario en jaro 1955.

Al lia agado estas ligita: farigo de filmo parolanta en Esperanto en 1956; la emisio de la unuaj Esperanto-poŝtmarkoj en 1957; eldono de Esperanto-vortaro en 1958. Ekde 1947 li partoprenis plurajn UK-jn kaj diversajn internaciajn konferencojn kaj naciajn kongresojn. Li estas komitatano de Hungara Esperanto-Asocio.

Ekde 1966 li funkcias kiel II-a sekretario-kasisto de IEAJ. Samjare je lia propono okazis la fondo de *Internacia Jura Revuo* kaj la elekto kiel ties redaktoro.

GENOCIDO

I. HISTORIA TRARIGARDO

La ideo pri kriminala respondeco pro kontraŭjuraj agoj faritaj dum milito estas relative nova.

En la antikva epoko nek la milito mem estis konsiderata kiel krima, nek kia ajn konduto de la malamikaj partioj unu al la alia kiel kontraŭa al kriminala juro. Ekzistis diversaj reguloj koncerne la formon de proklamado de milito aŭ koncerne kontraktadon de paco; ekzistis reguloj pri diplomaciaj senditoj, pri traktadoj, ankaŭ pri milittraktadoj. Sed ĉiuj ĉi reguloj apartenis al ĝenerala internacia juro kaj ne havis karakteron de kriminala juro. Al ili mankis kriminala sankcio. La personoj, kiuj malobservis regulojn, ne povis esti konsiderataj kiel kriminale respondecaj.

En la pli nova tempo — parte pro la ĉiam pli oftaj kaj pli teruraj militoj, parte pro la kreskanta konsciigo pri komunaj interesoj kaj pri la nepre necesa solidareco de la homa specio — aŭdiĝis ĉiam pli fortaj voĉoj, postulantaj ne nur reguligon de militaj agadoj, sed ankaŭ abolon de la milito kiel tia kaj kriminalan respondecon en okazo de agreso aŭ de malatento al internacie establitaj reguloj pri la kondukado de la militaj agadoj.

Iom post iom tiuj postuloj eliris el la fermitaj rondoj de teoriistoj. Pli larĝaj popoltavoloj ekinteresiĝis pri la demando. Ankaŭ la politikistoj, precipe se iliaj ŝtatoj estis la venkintoj, komencis akcentadi la kriman karakteron de kelkaj agoj de la malamiko. Farante tion, ili kompreneble samtempe kondamnis sin mem pro la samaj aŭ similaj agoj, kiujn ili faris aŭ faros en la estonteco.

Tiamaniere la ideo pri kriminala respondeco en la internacia vivo, traboradis al si vojon por fariĝi hodiaŭ unu el la plej gravaj aspektoj de la internacia juro.

La unuajn ĝermojn de tiu penso en la moderna senco oni trovas komence de la 19-a jarcento. Kiam Napoleono, post la famaj „cent tagoj“, oficiale rezignis pri la krono, oni proponadis, ke li estu juĝata de Angla Tribunalo. La Viena Kongreso deklaris, ke Napoleono, pro sia fuĝo desur la insulo Elba, „metis sin ekster la civitanajn kaj sociajn rilatojn“. Tamen, la proponita juĝado ne okazis. En aŭgusto 1815 estis decidite, ke Napoleono estu konsiderata kiel militkaptito de Britio, Ruslando, Aŭstrio kaj Pruslando. Kiel tia, li estis sendita al la insulo de Sankta Helena.

Post la Unua Mondmilito la aliancaj potencoj okupiĝis ankaŭ pri la demando de la militkrimuloj. En la Pactraktato de Versailles estis dirite, ke Vilhelmo la Dua devas esti metita antaŭ tribunalon, kiu juĝos lin „pro la plej granda malobeo al internacia moralo“. Estis antaŭvidite, ke la tribunalo konsistos el reprezentantoj de Francio, Britio, Usono, Italio kaj Japanio. Kiel konate, Vilhelmo ne estis tiam en la manoj de la Aliancaj. Jam la 10-an de novembro 1918 li transiris la ne-

derlandan limon kaj ekde tiu tempo troviĝis tie. La aliancaj potencoj petis la nederlandan registaron, ke ĝi transdonu al ili la germanan eksimperiestron, sed Nederlando rifuzis tion. En sia respondo la nederlanda registaro pravigis sian nean starpunkton en tiu afero per la nederlanda konstitucio kaj per siaj „jarcentaj tradicioj“, laŭ kiuj Nederlando „ĉiam estis rifuĝejo de la viktimoj de internaciaj konfliktoj“.

Koncerne la aliajn militkrimulojn la Traktato de Versailles antaŭvidis en art. 228, ke ili estos juĝataj de milittribunaloj de la Aliancaj Subskribante la Traktaton de Versailles, Germanio rekonis tiun rajton al la Aliancaj. Tamen, ankaŭ ĉi tio restis nur morta litero. Longe oni nenion faris. Fine la Aliancaj postulis de Germanio, ke ĝi mem juĝu kaj punu la oficirojn, kiuj estis respondecaj pro militkrimoj, nome pro agoj kontraŭaj al la leĝoj de milito, ĉar en tiu tempo la milito mem, kvankam agresa laŭ sia karaktero, ne estis malpermesita. Fakte, en Germanio okazis kelkaj procesoj, sed ĉiuj akuzitoj estis aŭ liberigitaj aŭ punitaj tute sen-signife.

Inter la du mondmilitoj — precipe post la fama Pakto Briand-Kellog, kiu proklamis la militon krimo — ĉiam pli aktualiĝis la demando, kiamaniere kontribui al protekto de la paco per rimedoj de kriminala internacia juro. Precipe grava estis la problemo pri kreo de Tribunalo por juĝado kaj punado de militkrimuloj. Kvankam oni multe diskutadis pri tiuj aferoj, tamen nenio estis fine decidita.

Tiam eksplodis la Dua Mondmilito. La krimoj, faritaj dum la pasinta granda milito aŭ en ligo kun ĝi, transpasis ĉion, kion eĉ la plei riĉa fantazio povis imagi. Oni ne nur mortigis homojn. Oni mortigadis ilin sisteme, preskaŭ science. Veraj hombuĉejoj kreiĝis ĉie tra Eŭropo kaj ankaŭ aliloke. Miliono da senkulpaĵaj estuloj perdis sian vivon en plej teruraj suferoj. Eĉ konsciencoj ĝis tiam dormintaj subite vekigis. Ion oni devis fari.

La Aliancaj plurfoje deklaris — kaj en unuopaj diplomaciaj notoj kaj en solenaj komunaj dokumentoj —, ke ĉiuj militkrimuloj estos juste punitaj post la milito.

Jam en la jaro 1943 oni komencis klare distingi du kategoriojn de militkrimuloj.

Al la unua kategorio apartenas tiuj militkrimuloj, kiuj en diversaj landoj, kiel apartenantoj de la okupantaj armeoj, faris diversajn krimojn. En la Deklaracio pri la Respondeco de la Militkrimuloj, akceptita dum la Moskva Konfereco en oktobro 1943, estis dirite, ke tiuj germanaj oficiroj kaj soldatoj, kaj tiuj membroj de la nazia partio, kiuj estas respondecaj pro la sennombraj krimoj, faritaj en la okupitaj teritorioj, estos transdonitaj al la landoj, en kiuj ili agis.

La dua kategorio de militkrimuloj konsistas el la t. n. „ĉefaj militkrimuloj“. Montriĝis, ke krom la personoj, kiuj rekte krimis en la okupitaj teritorioj, ekzistis

ankaŭ aliaj personoj, kiuj mem, per siaj propraj manoj, ne pendumadis, ne sufokadis per gaso, ne torturadis, sed kiuj, tamen, estas ĉefe respondecaj.

Pri la krimuloj, apartenantaj al tiu dua kategorio, la konferenco de Potsdam, okazinta en 1945, decidis, ke ili estos „kiel eble plej baldaŭ transdonitaj al justa juĝado”.

Kelkajn tagojn post tiu decido, la 8-an de aŭgusto 1945, la reprezentantoj de Britio, Usono, Soveta Unio kaj de la Provizora Registaro de Francio, subskribis apartan *Kontrakton pri la Persekutado kaj Punado* de la Ĉefaj Militkrimuloj de la Eŭropaj-Aksaj Potencoj. Al la Kontrakto estis aldonita la *Statuto de la Internacia Milittribunalo*.

La aktoj de la 8-a de aŭgusto markas novan etapon en la evoluo de la internacia juro. Grava branĉo — tiu de internacia kriminala juro — komencis tiun tagon sian efektivan vivon.

Laŭ la aktoj de la 8-a de aŭgusto ekzistas tri kategorioj de militkrimoj: (a) *krimoj kontraŭ la paco*, (b) *krimoj kontraŭ la leĝoj kaj kutimoj de la milito*, (c) *krimoj kontraŭ la homeco*.

Al la grupo de krimoj kontraŭ la paco apartenas diversaj krimaj agadoj, ekzemple planado, preparado aŭ instigado al atakmilito, aŭ al milito, per kiu oni malobservas internaciajn kontraktojn, interkonsentojn aŭ garantiĵojn. Estas konsiderata kiel krimo kontraŭ la paco ne nur la agreso mem, sed ankaŭ ĉiu ajn partoprenado en komplotoj por realigi ĝin. Kiel oni vidas, ne ĉiu milito estas konsiderata kiel krimo. Nur atakmilito estas jure krima, nur ĝi estas malpermesita de la internacia juro laŭ la aktoj de la 8-a de aŭgusto, kaj la malobeo de tiu malpermeso estas kriminale sankciita. Tio estas klara per si mem: justa, defenda milito, nome milito farita por sin defendi kontraŭ la agreso, eĉ se pro la minacanta agredanĝero oni ekpafas la unuan kuglon, ne povas esti konsiderata kiel krima. Ĝi ne nur estas malpermesita, sed, tute kontraŭe, ĝi estas rimedo por kontraŭstari al agreso. Same kiel sindefendo en interna kriminala juro senigas la agon de ĝia kontraŭjura karaktero, tiel same sindefenda milito ne estas kontraŭjura laŭ la publika internacia juro.

Egale ĉu temas pri krima milito (agreso) aŭ pri permesita, la milito devas esti kondukata laŭ difinitaj principoj kaj reguloj. Malobservo de la plej gravaj el tiuj reguloj, ĉe se temas pri permesita milito, estas hodiaŭ konsiderata kiel aparta krimo. Tiu krimo, kutime nomata „militkrimo” en la mallarĝa senco de la vorto, rilatas al ĉiuj agoj faritaj kontraŭ la leĝoj kaj kutimoj de milito. Temas precipe pri agoj, kiujn malpermesis la Kvara Haga Konvencio de 1907 kaj ĝia Aldona Regularo. — La Statuto de la Milittribunalo mencias, kiel ekzemplojn, nur kelkajn el ili: mortigo, torturado aŭ sendado al devigaj laboroj de la civila loĝantaro en la okupitaj landoj; mortigo aŭ torturado de la militkaptitoj; rabado de privata aŭ publika havaĵo: superflua detruado de urboj, lokoj kaj vilaĝoj, ruinigoj, kiuj ne estas pravigeblaj per la bezonoj de la milito.

Al la tria kategorio de internacia krimo apartenas la *krimoj kontraŭ la homeco*. La unuopaj krimoj de tiu kategorio estas tre multnombraj. Mortigo, ekstermado,

sklavigado aŭ disloĝigado de la civila loĝantaro antaŭ aŭ dum la milito estas, ekz., krimo kontraŭ la homeco. Ankaŭ persekutoj pro politikaj, religiaj aŭ rasaj kaŭzoj apartenas al tiu kategorio de internacia krimo, se tiuj agoj estas faritaj en ligo kun kiu ajn alia internacia krimo.

Kvankam la unuopaj internaciaj krimoj povas esti faritaj ankaŭ antaŭ la milito aŭ ekster ĝi (ekzemple planado de agreso, aŭ persekutoj pro politikaj kaŭzoj), tamen ĉiu el tiuj agoj, por ke ĝi estu krima laŭ la aktoj de la 8-a de aŭgusto, devas esti iamaniere ligita al milito. Tio estas grava manko, precipe en la kazo de krimoj kontraŭ la homeco. Tial, tuj post la formiĝo de Unuiĝintaj Nacioj, oni entreprenis paŝojn por protekti la homan personon per rimedoj de internacia juro ankaŭ ekster la kadroj de la ĵus prezentita internacia krimo.

Unuavice necesas menci, ke la Ĉarto mem de Unuiĝintaj Nacioj en la Solena Enkonduko rekonas la fidon je la fundamentaj rajtoj de la homo, je la digno kaj valoro de la homa personeco, je la egaleco de ĉiuj viroj kaj virinoj, de ĉiuj nacioj: grandaj kaj malgrandaj. La Ĉarto mencias la homajn rajtojn plurfoje ankaŭ en la teksto mem. Poste, la 10-an de decembro 1948, la Ĝenerala Asembleo de UN akceptis en Parizo la konatan Universalan Deklaracion pri la Homaj Rajtoj, kaj antaŭnelonge estis, fine, ellaboritaj ankaŭ projektoj de konvencioj por protekto de la homaj rajtoj. La Packontraktoj de la 10-a de februaro 1947 devigis 5 ŝtatojn rekonati kaj observi kelkajn bazajn homajn rajtojn. Krome, konforme al la aktoj de la 8-a de aŭgusto 1945, la ĉefaj militkrimuloj estis juĝataj kaj punitaj de internaciaj tribunaloj.

El vidpunkto de la Homaj Rajtoj apartan gravecon havas la krimo kontraŭ la homeco. En la Statuto de la Internacia Tribunalo de la 8-a de aŭgusto 1945 tiu krimo estas difinita kiel mortigo, ekstermo, sklavigo, dislokigo kaj aliaj nehumanaj agoj, faritaj kontraŭ la civila loĝantaro antaŭ aŭ dum la milito, kiel ankaŭ persekutoj pro politikaj, religiaj aŭ rasaj kaŭzoj, faritaj en ligo kun la plenumo de kiu ajn alia internacia krimo, apartenanta al kompetenco de la Tribunalo. El la difino estas klare videble, ke multaj krimoj kontraŭ la homeco restis nepunitaj, ĉar ili ne estis ampleksitaj per la difino. Ĝi, kiel ni vidis, postulas, ke tiuj krimoj estu faritaj en ligo kun kiu ajn alia internacia krimo, do en ligo kun la krimo kontraŭ la paco aŭ kun la krimo kontraŭ la leĝoj kaj kutimoj de la milito. Tiu manko kaŭzis fortajn kritikojn. Oni prave postulis, ke ankaŭ tiuj agoj kontraŭ la homeco, kiujn ne antaŭvidis la aktoj de la 8-a de aŭgusto, estu difinitaj kiel krimoj kaj ĝuu la protekton de internacia kriminala juro. Tiu postulo estis realigita, almenaŭ parte, per la *Konvencio pri Genocido de la 9-a de decembro 1948*.

II. PREPARLABOROJ

Same kiel la procesoj de Nürnberg kaj Tokio kontraŭ la militkrimuloj elvokis vastan diskuton, en kiu juraj kaj pseŭdojuraj argumentoj intermiksiĝis kun politikaj starpunktoj kaj aspiroj, tiel same la ideo mem difini genocidon kiel krimon de internacia juro kaŭzis kontraŭ-

staron en kelkaj medioj. Ilia ĉefa argumento estis tiu jam kaduka tezo — tamen plue alloga por multaj, kiuj ne povas vidi la progreson aŭ konscie obstaklas ĝin — ke genocido ĉiam ekzistis kaj ke sekve nenio estas far- ebla sur tiu kampo.

Estas vero, ke agoj, hodiaŭ rigardataj kiel krimoj kontraŭ la homoco, estas verŝajne tiel malnovaj, kiel la homaro, sed ĉu tio per si mem devas signifi, ke ili estu rezignacie rigardataj kiel io neforigebla el la homa socio? La fakto, ke jam antaŭ jarmiloj oni kutimis, laŭ la tiamaĵ moralaj kaj juraj konceptoj, bruligi vila- ĝojn kaj urbojn, prirabi havaĵojn, sklavigi plenkresku- lojn kaj infanojn, aŭ eĉ dezertigi tutajn teritoriojn, ne- niel signifas, ke oni rajtas senpune fari la samon en epoko kun tute aliaj konceptoj de internaciaj juro kaj moralo. Masakro sub Herodo aŭ deportado de Judoj al Babilono, aŭ persekutoj kontraŭ Kristanoj sub Ne- rono, aŭ kiu ajn alia samkaraktara evento de la pasint- eco, evidente ne povas pravigi similajn, aŭ eĉ pli teru- rajn agojn en la nuntempo.

Tio, kompreneble, ne signifas, ke tiaj agoj ne okazis en la moderna epoko. Ne nur, ke ili okazis, sed, eĉ pli, ili formis parton de konscie ellaborita politiko. Necesas nur rememorigi, ke komence de 1941 Himmler prezentis la oficialan nazian politikon por ekstermado de Judoj kaj Slavoj, „kies nombro devas esti reduktita per 30 mi- liojn”. Laŭ Jakob Leĉinski, membro de la Instituto pri Judaĵ Problemoj, en 6 jaroj, nome inter 1939 kaj 1945, pli ol unu triono de la juda loĝantaro estis ekstermita: en Nederlando 60% de ĉiuj Judoj estis mortigitaj, en Aŭstrio 66%, en Greklando 80%, en Germanio 81%, en Ĉeĥoslovakio 82%, en Pollando 85%, en Letonio 89,5%, en Litovio 90%. Sole en Varsovio, el 352 599 Judoj restis malpli ol 6000, dum en Leipzig restis entute nur 15 el 11 564 Judoj. La ekstermo de pli ol 8 milionoj da propraj kaj alilandaj civitanoj fare de la nazia Germanio, kaj si- milaj praktikoj de aliaj ŝtatoj, kune kun la multnombraj internaciaj krimoj de aliaj kategorioj, faritaj dum la milito aŭ en ligo kun ĝi, estis potenca superpezo kontraŭ la pseŭdosciencaj argumentoj de rondoj, kiuj obstaklis la difinon de genocido kiel krimo de internacia juro.

Tuj post la proceso en Nürnberg la tiama Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, Trygve Lie, sugestis la enkorpigon de la principoj de Nürnberg en interna- cian kriminalan juron. Kubo, Hindio kaj Panamo propo- nis studon por esplori la eblecon deklari genocidon „krimo de internacia juro”. En tiu propono genocido estis kvalifikita kiel neado de la ekzistaro de homgru- poj, same kiel homicido (hommortigo) signifas neadon de ekzistaro de individuo. La propono estis sendita al la Sesa Komisiono (pri Juraj Demandoj) de la Ĝenerala Asembleo, kie ĝi estis atente pristudita. La Komisiono faris raporton al la Ĝenerala Asembleo, en kiu ĝi reko- mendis, ke la Ĝenerala Asembleo rekonu, ke „genocido estas krimo de internacia juro, kondamnita de la civi- lizita mondo, kies ĉefaj aŭtoroj kaj iliaj komplicoj — ĉu personoj privataj, ĉu funkciuloj aŭ oficialaj reprezent- antoj de iu ŝtato — devas esti punitaj tute egale ĉu ili agis pro motivoj rasismaj, religiaj, politikaj aŭ aliaj.” La Komisiono plue rekomendis, ke la Ĝenerala Asemb- leo invitu la Ŝtatojn-Membrojn „entrepreni la necesajn

paŝojn por preventi kaj subpremi tiun ĉi krimon”, kaj komisiu al la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro la taskon fari „la necesajn studojn kun la celo redakti projekton de Konvencio pri Genocido”.

La Ĝenerala Asembleo akceptis ĉiujn ĉi proponojn per la Rezolucio 96/I. de la 11-a de decembro 1946. Re- zulte, la Sekretariato ellaboris antaŭprojekton de konven- cio kun helpo de la t. n. grupo de ekspertoj, en kiu trov- iĝis profesoroj Donnadieu de Vabres, Pella kaj Lemkin. La antaŭprojekto estis pritraktita de aparta „Speciala Komitato pri Genocido”, kiu, post ricevo de pluraj ko- mentoj de la Ŝtatoj-Membroj, ellaboris la definitivan projekton.

Tiu definitiva projekto estis unue prezentita al la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro kaj poste al la Tria Se- sio de la Ĝenerala Asembleo, okazinta en Parizo. en Pa- lais de Chailot, en aŭtuno de 1948. En Parizo la projekton pritraktis la Sesa Komisiono de la Ĝenerala Asembleo.

Fine, la 9-an de decembro 1948, do unu tagon antaŭ la akcepto de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, la Ĝenerala Asembleo unuanime, nome per ĉiuj voĉoj de la tiamaĵ 55 membroj de UN, akceptis la Kon- vencion en difinitiva formo. La Konvencio ekvalidis la 12-an de januaro 1951, 90 tagojn post la depono de la 20-a instrumento pri ratifo, konforme al la art. 13.

III. DIFINO KAJ ANALIZO

La Konvencio pri Prevento kaj Punado de la Krimo de Genocido de la 9-a de decembro 1948 konsistas el Enkonduko kaj 14 artikoloj.

La Enkonduko unuavice mencias la Rezolucion de la Ĝenerala Asembleo de la 11-a de decembro 1946, kiu deklaris genocidon krimo de internacia juro, „kontraŭa al la spirito kaj celoj de UN kaj kondamnita de la civilizita mondo”. La dua alineo de la Enkonduko re- konas, „ke en ĉiuj periodoj de la historio genocido kaŭ- zis grandajn perdojn al la homaro”. La projekto de la Konvencio enhavis parton rilatantan al la krimoj de la nazia reĝimo, sed en la fina teksto oni ellasis ĝin, ĉar oni deziris doni al la koncepto de genocido pli vastan sencon. La lasta alieno esprimas la konvinkon, ke estas necesa internacia kunlaborado, se oni volas „liberigi la homaron de tiu abomena skurĝo”. Sekve, la celo de la tuta Konvencio estas preventi aŭ subpremi genocidon kiel internacian krimon per internaciaj rimedoj. Kiel vidiĝos el la analizo de la Konvencio, la preskriboj en- tenataj en la teksto mem nur parte respondas al la ĉefa celo, solene proklamita en la Enkonduko.

En art. 1 la kontraktantaj partioj konfirmas, ke genocido, tute egale ĉu farita en tempo de paco aŭ en tiu de milito, estas krimo de internacia juro, kiun ili decidis preventi kaj puni.

Art. 2 de la Konvencio difinas genocidon kiel kri- mon direktitan kontraŭ tutaj homgrupoj. *Genocido sig- nifas*, kiun ajn el la sekvantaj agoj, faritaj kun la celo detrui, plene aŭ parte, nacian, etnikan, rasan aŭ religian grupon kiel tian: (a) *mortigado de la membroj de la grupo*; (b) *kaŭzado de grava korpa aŭ mensa damaĝo al la membroj de la grupo*; (c) *intenco altrudo al la grupo de vivkondiĉoj planitaj kaŭzi ĝian fizikan det-*

ruon plene aŭ parte; (ĉ) altrudo de cirkonstancoj, kies celo estas preventi naskiĝojn ene de la grupo; (d) perforta transiĝo de infanoj de la grupo al alia grupo.

Ciu ajn el la menciitaj agoj estas per si mem krimo de genocido, se tiu ago estas farita kun la celo detrui plene aŭ parte la grupojn kiel tian. La projekto antaŭvidis plian elementon, nome, ke la agoj formantaj la krimon de genocido estu faritaj dole (*dolus*). Tio, kompreneble, limigus kaj mallarĝigus la koncepton de genocido. Oni, do, ellasis en la fina redakto la postulon pri dolo kaj anstataŭe kontentiĝis pri la formulo „agoj, faritaj kun la celo...”

La projekto parolis ne nur pri nacia, rasa aŭ religia grupo, sed ankaŭ pri „politika”. Tiu „politika genocido” kaŭzis grandegan diskuton, ĉar pluraj ŝtatoj, unuavice Soveta Unio, forte kontraŭstaris ĝin. Oni argumentis, ke per enmeto de la „politika genocido” en la Konvencion oni senigus la koncepton de ĝia vera senco, ĉar genocido ja estas unuavice direktita al detruo de homgrupo pro ĝia nacia aŭ rasa karaktero. Aliflanke, oni kontraŭargumentis, ke detruado de rasa aŭ nacia grupo ne estas pli abomeninda ol detruado de homgrupo pro la politikaj konvinkoj de ĝiaj membroj. Fine, por savi la universalecon de la Konvencio, tiam atendatan, oni rezignis pri la „politika genocido” kaj ĝi ne troviĝas en la Konvencio.

Aliflanke, en la unua projekto ellaborita de la Sekretariato, kiel ankaŭ en la projekto farita de la jam menciita „Speciala Komitato pri Genocido”, troviĝis ankaŭ la t. n. „kultura genocido”. En tiuj projektoj ĝi estis definita kiel krimo farita „per diversaj agoj, kiaj estas malpermeso utiligi la lingvon de la grupo en la ĉiutagaj rilatoj aŭ en la lernejoj, aŭ presigi aŭ disvastigi publikaĵojn en la lingvo de la grupo”, plue ankaŭ „detruado de bibliotekoj, muzeoj, lernejoj, historiaj monumentoj, lokoj de kulto kaj aliaj institucioj kaj kulturaj objektoj de la grupo, aŭ malpermeso utiligi ilin”.

La pledantoj por enmeto de la kultura genocido en la Konvencion argumentis, ke ekzistas du manieroj por detrui homan grupon. La unua estas „fizika ekstermo de ĝiaj membroj”, dum la dua konsistas en „detruo de la specifaj trajtoj de difinita grupo” sen fizika ekstermado de la unuopaj individuoj, el kiuj konsistas la grupo. Ili insistis, ke la Konvencio ne respondos al sia celo, se ĝi ignoros tiun duan formon, kiu, ili asertis, „estas nedisigebla de la unua”.

La kultura genocido elvokis ne malpli grandajn diskutojn ol la politika. Por ĝi precipe pledis la landoj, kiuj ĝin spertis sub la nazia okupado: Soveta Unio, Pollando kaj kelkaj aliaj. Ĉe la alia flanko troviĝis la ŝtatoj, kiuj ne deziris, ke la kultura genocido eniru la Konvencion. Iliaj reprezentantoj asertis, ke en la historio ne malofte okazis, ke unu nacio aŭ gento kulture englutis alian, kaj ke, se oni akceptus la koncepton de kultura genocido, oni devus hodiaŭ kulpigi multajn naciojn pro ĝi. Fakte, ne tre forta pozicio, ĉar la samon oni povus diri pri kiu ajn alia formo de genocido. La plej forta argumento de tiu grupo estis la malfacilaĵoj, kiujn kaŭzus la provoj difini la limojn de kultura genocido, kiu — ili asertis — intermiksiĝas kun la malobservo de la homaj rajtoj kaj la rajtoj de minoritatoj.

Per efika protekto de tiuj rajtoj — ili asertis — oni devus malebligi en la estonteco la agojn, kiujn la alia flanko volus enmeti en la nocion de genocido. Pretere estu dirite, ke la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj de la 10-a de decembro mencias la lingvon en pluraj kuntekstoj. Ankaŭ la novaj projektoj de konvencioj pri la ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, kaj pri la civilaj kaj politikaj rajtoj, akceptitaj la 16-an de decembro 1966, eksplicite protektas „la kulturen, religian kaj lingvan heredaĵon de la minoritatoj”, sed tiuj internaciaj aktoj ankoraŭ ne ekvalidis.

La kultura genocido estis forĵetita per 25 voĉoj kontraŭ 16 favoraj.

Tiamaniere, nek la politika, nek la kultura genocido eniris en la Konvencion. Anstataŭe oni aldonis al la difino la koncepton de „etnika grupo”.

Laŭ art. 3 de la Konvencio, punendaĵ estas ne nur genocido, sed ankaŭ konspirado, publika incitado, provo kaj kompileco rilate genocidon.

La personoj, kiuj kulpas pro genocido aŭ pri kiu ajn alia ago menciita en art. 3, devas esti punitaj, tute egale ĉu ili estis konstitucie respondecaj funkciuloj de la ŝtato, publikaj oficistoj aŭ privataj individuoj. (art. 4.)

Art. 5—8 entenas diversajn preskribojn, kiuj difinas la devojn de la kontraktantaj partioj rilate genocidon kaj la kunligaj agoj el la art. 3. Interalie ili devas enkonduki leĝojn por establi efikajn punojn por personoj kulpaj pro genocidaj agoj. Tiuj personoj devas esti juĝataj de kompetentaj tribunaloj de la ŝtatoj, sur kies teritorioj la krimoj estis faritaj. Tre grava estas la principa preskribo de art. 6, kiu antaŭvidas establon de internacia kriminala tribunalo kun kompetenteco rilate al tiuj partioj de la Konvencio, „kiuj estos akceptintaj ĝian jurisdikcion”. Bedaŭrinde, ĝis la nuna momento, nek la Tribunalo estas formita, nek kiu ajn ŝtato deklaris sin preta submetiĝi al la kompetenteco de tia instanco, se ĝi iam estos fondita. Ĉar multaj ŝtatoj malpermesas ekstradicion pro la t. n. politikaj krimoj, la Konvencio eksplicite deklaras, ke genocido ne estas tia krimo kaj la partioj devigas sin ekstradicii akuzitojn pro genocido „konforme al siaj leĝoj kaj validaj trajtoj”. Menciinda estas la regulo, ke ĉiu partio de la Konvencio povas inviti la organizaĵon de UN, ke ĝi pere de siaj organoj entreprenu tiajn paŝojn konforme al la Ĉarto, kiuj estos konsiderataj kiel konvenaj por preventi aŭ subpremi agojn de genocido aŭ kiu ajn alian agon en ligo kun genocido laŭ la difino el art. 3.

Art. 9 de la Konvencio rilatas al malkonsentoj koncerne interpretadon, aplikadon kaj plenumadon de la Konvencio, inkluzive la respondecon de iu ŝtato pro genocido aŭ pro kiu ajn el aliaj agoj menciitaj en art. 3. Ĝi preskribas, ke tiuj malkonsentoj estos prezentitaj por prijuĝo al la Internacia Kortumo en Hago je postulo de kiu ajn partio de la malkonsento.

Art. 10 ĝis 14 rilatas al aŭtentikaj tekstoj de la Konvencio (angla, franca, rusa, hispana kaj ĉina); al reguloj pri subskribado, ratifado kaj aliĝado al la Konvencio; al vastigo de ĝia valideco al teritorioj, pri kies eksteraj rilatoj respondecas iu el la partioj; al momento de validiĝo kaj al periodo de valideco de la Konvencio.

Krom la art. 2 kaj 3, kiuj difinas la koncepton de genocido kaj la krimajn agojn ligitajn al tiu koncepto, la plej gravan signifon havas art. 9 de la Konvencio. kiu preskribas la devigan kompetentecon de la Internacia Kortumo por ĉiuj malkonsentoj inter la partioj de la Konvencio. Ĝi estas gravega ĝuste tial, ĉar ĝi donas almenaŭ parte internacian kontrolon pri la plenumado de la principoj kaj preskriboj de la Konvencio. Bedaŭrinde, kelkaj ŝtatoj akceptis la Konvencion, sed faris rezervecojn precize pri la art. 9. En internacia juro „rezervo” signifas, ke ŝtato faranta ĝin, ne akceptas la koncernan preskribon, kvankam ĝi akceptas la nerezervitajn artikolojn de la interkonsento.

Okaze de sia aliĝo al la Konvencio la 12-an de julio 1950 Bulgario eksplicite faris rezervon rilate art. 9. Ĝi deklaris, ke tiu art. ne validos por Bulgario, ĉar, laŭ ĝia opinio, la eventualaj malkonsentoj povas esti submetitaj por prijuĝo de la Internacia Kortumo ne surbaze de unuflanka plendo de unu el la partioj laŭ tiu artikolo, sed nur surbaze de aparta interkonsento de la partioj en ĉiu individua kazo. Identajn rezervecojn faris jam okaze de la subskribado de la Konvencio Soveta Unio, Bjelorusio, Ukrainio (la 16-an de decembro 1949) kaj Ĉeĥoslovakio (la 28-an de decembro 1949). Ankaŭ kelkaj aliaj ŝtatoj, ekzemple Pollando, Rumanio, Hungario, Filipinoj, faris diversajn rezervecojn rilate tiun kaj aliajn artikolojn. La multnombraj rezervecoj, precipe tiuj rilatantaj al art. 9, devigis la Ĝeneralan Asembleon de UN peti de la Internacia Kortumo konsultan opinion pri la akordigeblo de la rezervecoj kun la Konvencio.

En sia fama decido de 1951, akceptita per la voĉoj de 7 juĝistoj kontraŭ 5, la Internacia Kortumo malproksimiĝis de la antaŭa praktiko, laŭ kiu ĉiuj partioj de iu multflanka internacia traktato devas konsenti pri la rezervecoj, por ke la rezervanta ŝtato povu esti konsiderata kiel partio. La Kortumo efektive esprimis la opinion, ke ŝtato, kiu faris rezervon, povas esti konsiderata kiel partio de multflanka konvencio, kvankam pluraj ŝtatoj kontrŭstaris la rezervon, sed aliaj ne, se la rezervo estas en akordo kun la ĉefa celo de la Konvencio. Tamen, se iu ŝtato malakceptas la rezervon kiel neakordigeblan kun la ĉefa celo, ĝi rajtas konsideri, ke la rezervanta ŝtato ne estas partio de la Konvencio. Aliflanke, se iu ŝtato akceptas la rezervon kaj opinias ĝin en akordo kun la ĉefa konvencia celo, tiu ŝtato rajtas rigardi la rezervantan ŝtaton kiel partion de la Konvencio.

Kiel menciite pli frue, la ĉefa celo de la Konvencio, eksplicite menciite en la Enkonduko, estas preventi aŭ subpremi genocidon kiel internacian krimon, kiel apartan krimon kontraŭ la homeco, ne per naciaj, sed per internaciaj rimedoj. Se tiu ĉefa celo ne povas esti atingita almenaŭ parte — kaj art. 9 donas precize almenaŭ minimuman internacian garantian —, tiam la tuta Konvencio fakte perdas sian sencon. Ne estas malfacile, do, kompreni, ke en kazo de Konvencio de tiu ĉi speco la deviga jurisdikcio de la Internacia Kortumo estas esenca elemento por la plenumo de la ĉefa celo de la konvencio. Tial rezervo celanta ekskludi la jurisdikcion de la Kortumo povas prave esti konsiderata kiel neakordigebla kun la ĉefa celo.

IV. KONKLUDO

Genocido ne anstatuigas la tri kategoriojn de internacia krimo, difinitajn en la aktoj de la 8-a de aŭgusto 1945. Ĝi estas nova kategorio de internacia krimo, kiu, diference de la krimo kontraŭ la homeco laŭ la aktoj de la 8-a de aŭgusto, povas esti farita ankaŭ en tempo de paco kaj sen kiu ajn ligo kun la ceteraj internaciaj krimoj. Tiamaniere estas plenigita grava jura vakuo. Tio per si mem signifas konsiderindan paŝon antaŭen.

La Konvencio pri genocido havas la taskon protekti la ekzistorajton de homgrupoj. Milionoj da homoj estis viktimoj de tiu krimo en la proksima pasinteco kaj ankaŭ hodiaŭ tiu krima agado ne plene ĉesis. Ili estis mortigataj, torturataj, dislokigitaj nur tial, ĉar ili apartenis al difinitaj rasoj, nacioj aŭ religioj. Ĉio ĉi estis farata de la ŝtata potenco rekte aŭ kun ĝia helpo, surbaze de internaj leĝoj, kiuj permesadis tiun monstran krimon. Per la Konvencio la ŝtatoj devigas sin preventi genocidon, persekutadi kaj punadi la krimulojn. Efektive, multaj ŝtatoj enkondukis en siajn resp. kriminalajn kodojn la novan krimon konforme al la difino de la Konvencio, kaj preskribis severajn punojn por la krimintoj. Ankaŭ tio estas reala progreso, ĉar estas ja grandega diferenco inter jura permesado de genocido kaj oficiala instigado plenumi ĝin, unuflanke, kaj la jura difino de genocido kiel krimo, aliflanke.

Estas, sendube, tre bedaŭrinde, ke la subpremo de genocido estas lasita en la manoj de la unuopaj ŝtatoj. En la pasinteco la ĉefaj kulpuloj pri tiu krimo ja ne estis la amasoj, sed la politikaj gvidantoj de la ŝtatoj, kiuj pro tiu celo utiligis la tutan aparaton de la ŝtata potenco. Multe pli fortaj garantioj estus donitaj, se la preventado kaj subpremado de genocido troviĝus plene en la manoj de internaciaj organismoj, precipe de iu internacia tribunalo. Tamen, la fakto mem, ke la krimo estas difinita, ke la membroj de Unuiĝintaj Nacioj akceptis tiun difinon, signifas plian pozitivan aspekton de la Konvencio. Neniu krimulo povos sin defendi dirante, ke la interna juro de ia lando ne malpermesas al li fari agojn, kiuj estas difinitaj kiel genocido. Li ne povos sin defendi per la principo *nullum crimen sine lege* aŭ per tio, ke la superuloj ordonis al li kontraŭ difinitaj homgrupoj. Genocido estas difinita unufojon por ĉiam kiel krimo de internacia juro. Sekve, la internaj juraj sistemoj devas konformiĝi al tiu ŝtato. Ili ne povas permesi ion, kion la internacia juro malpermesas. Se la juro de iu ŝtato malharmonias kun la principoj aŭ reguloj de internacia kriminala juro, tiu interna sistemo estas kontraŭjura kaj la civitanoj rajtas malobei ĝiajn jurajn ordonojn, kiuj kontraŭas al la internacia juro. Krome, la personoj respondecaj pri la kontraŭleĝeco de la koncerna jura sistemo, devas esti konsiderataj kiel rompantoj de la internacia juro. Sur la kampo de subpremado de ĉiuj kategorioj de internacia krimo, ili devas esti konsiderataj kiel krimuloj, kontraŭ kiuj la plej severaj punoj estas aplikendaj. Povas okazi, ke pro la politika situacio en la mondo tiuj krimuloj ne estos juĝataj dum longa tempo aŭ eĉ ke ili sukcesos eviti kiun ajn punon. Tio tamen ne senigas iliajn agojn de krima karaktero kaj tio ankaŭ ne signifas, ke ili

Fundamento de la (Ĝenerala) Kriminala Punjuro de la Spaco

Esence la historio de la esploro kaj konkero de la Spaco ne daŭras pli ol 12 jarojn. Sed tiu ĉi eta tempo enmetiĝas en kadrojn de la miriga evoluo de la teknologio de la lastaj 65 jaroj, kies frukto estis la koncernaj klopodoj. Tial la esploro de la Spaco, speciale la branĉo de la Aeronautiko, povis evolui ĝis tia punkto, ke la alegorio de Dedalo kaj Ikaro de la Minoa-epoko, la fantasmagorioj de Bergerec kaj Verne, la Sugestoj de Ciolkowski, la kalkuloj de Obert, perdis jam siajn sensaciajn signifojn. La rigardo de la homo, aliffoje timema aŭ petega, komencis jam sin turni postuleme al la spaca trans la tero.

Ĝuste al tiu ĉi punkto ekestis necesa la interveno de la Juro. Kaj estas karakteriza, ke la Ĝenerala Kunveno de UN per sia Rezolucio II. 48. (XII) de 14. II. 1957, post 40 tagoj ekde la eljeto de la unua artefarita satelito (Sputnik), esprimis sin pri komuna studo de kontrolsistemo, kiu certigos la eljetadon de mekanikaj aparatoj en la Spacon ekskluzive nur por paca kaj sciencaj celoj.

Ni ne volas eniri en detalojn pri la plua evoluo de la tiele aperinta Juro de la Spaco,¹ kiu pro manko de pli parenca jura branĉo enmetiĝis en la Internacian Publikan Juron.² Ni simple mencias nian opinionon, laŭ kiu ni antaŭvidas rapida la aŭtonomiĝon de tiu ĉi jurbranĉo, pro kaŭzo de la specialaj temoj, pri kiuj ĝi okupiĝas, pro la diferenco en la uzita metodo³ kaj pro la ekaperanta bezono de ĝia dividiĝo laŭ branĉoj. Al tiuj ĉi ni aldonas la tendencon de dividiĝo de la tuta juro al Tera kaj Spaca.⁴ Ĉiukaze, ni konkludas al tio, ke ĉefe post la laste subskribita Konvencio,⁵ ni neniel povas akcepti, ke la homa aktiviĝo por la Spaco, restas jure neregulita.⁶ Kontraŭe, ĉefe post la supre dirita Konvencio de 27. Januaro 1967 „*Pri la principoj regantaj la aktiviĝon de la Ŝtatoj, dum la esploro kaj uzo de la eksteratmosfera Spaco, inkluzive la Lunon kaj la ceterajn ĉielajn korpojn*”, malfermiĝas vasta vojo por solvo de tre gravaj problemoj, kiuj ĝis tiam, nur elemente povus esti regulitaj surbaze de la ĝeneralaj principoj de la Internacia Publika Juro.

Unuavice ni povas apartigi la Kriminaljuron de la Spaco. Kiel studotemojn de tiu ĉi nova branĉo, ni povus konsideri la premisojn por aljuĝi punsankciojn pro la farataj maljustaĵoj (krimoj) en la spaca aktiviĝo.⁷ Ni tuŝos en la sekvantaj ĉapitroj la pli gravajn el tiuj ĉi premisojn.

La unuaj demandoj koncernas laŭ logika vico a) la fontojn, b) la konsiston de la reguloj, c) la enhavon kaj d) la procezon de la aplikado de la Spacjuro.

a) Fonto de la Punjuro de la Spaco estas konsiderbla principe la Konvencia Spaca Juro kun la dispozicioj de la Ĉarto de UN (Art. I. paragrafo 2/III. de tiu ĉi Konvencio), kaj kun la rilataj rezolucioj de la Ĝenerala Konferenco de UN.⁸ Poste oni povus kunmeti la oficiale formulitajn vidpunktojn de la diversaj ŝtatoj, la kutimjuron,⁹ la regulojn de la Internacia Juro, la ĝeneralajn principojn aŭ instruojn de la nomata Internacia Publika Punjuro kaj ĉefe tiujn de la Aeronautika Juro,¹⁰ la ĝeneralajn principojn de la interna punjuro, rekonatajn de la civilizitaj ŝtatoj, la rilatajn tribunalaĵajn decidojn kaj la opiniojn de la plej eminentaj sciencistoj, kiuj okupiĝis pri la Spaca Juro.

b) koncerne la konsiston de la Punjuro de la Spaco, ni devus prikonsideri ĉefe la menciitan Internacian Publikan Punjuron. Tiu ĉi branĉo, kunmiksaĵo de Internacia Publika kaj Interna Puna Juro, disvolviĝis ĉefe postmilite, pli precize post verdiktoj de militistaj Internaciaj Tribunaloj kaj pli grave post tiuj de Nürnberg, kaj post la Deklaracio de la Homaj Rajtoj. La Internacia Publika Puna Juro konsideriĝas deviga juro (*ius cogens*), t. e. kiel enhavanta devigajn regulojn de Internacia Juro.¹¹ Sed la tuta finformiĝo kaj ĝia efektivigeblo antaŭkondiĉas preterpason de kelkaj dogmaj obstakloj de la Internacia Publika Juro, kiel ankaŭ la altgradan ŝanĝon de kelkaj principoj de la Interna Puna Juro. Ambaŭ tiuj ĉi koncernas ĉefe:

1. La dogmon de la absoluta suvereneco de la Ŝtatoj, laŭ kiu, sur la tero estas konsiderata plej supera leĝa ordo tiu, kiun kreas ĉiu Ŝtato.¹² Ties konsekvenco estas,

tute certe dum sia vivodaŭro sukcesos eviti la merititan punon. En ĉiu okazo la Konvencio estas serioza admono por ĉiuj, kiuj krimas aŭ inklinas krimi pri genocido.

Iuj internaciistoj asertis, ke la Konvencio havas pli moralan ol juran valoron. Mi opinias, ke ili eraras en ĉi rilato same tiel, kiel ili eraris rilate la atingopovon de la Universala Deklaracio. Estas tute certe, ke la Konvencio havas en ĉiu okazo grandan

moralan signifon, sed estas nepardonebla eraro limigi ĝin al nura morala kategorio. Certe, el jura vidpunkto la Konvencio havas mankojn, pri kiuj mi koncize atentigis. Certe, ĝi ne donas tian internacian juran protekton, kian la plej progresemaj juristoj deziris kaj plue postulas. Tamen, eĉ kun mankoj ĝi havas rimarkindajn juran valoron kaj signas mejloŝtonon en la progresiva evoluo de internacia juro.

ke subjektoj de la Internacia Juro konsideriĝas nur la Ŝtatoj, dum samtempe ne respondecas iliaj regantoj por agoj, kiujn ili faras je la nomo kaj por intereso de ilia Ŝtato.¹³

2. La celon de la puno, kiu enretiĝis en la teoriojn de la ĝenerala kaj speciala prevento (nome rekompenco per la puno de la kaŭzita malbono, kaj reedukado de la krimulo pere de la puno).

3. La aksiomon „*Neniu krimo, neniu puno sen leĝo*“. Ĝi validiĝas ĉefe en la landoj de liberalaj principoj, dum en la aliaj (ne estas esceptata eĉ Anglujo, en kiu regas la konata juĝista juro) ĝi estas ignorata.

4. La fundamenton de la maljusteco de la puninda ago. Ankaŭ pri tio ne ekzistas sama opinio. Laŭ la regantaj opinioj en okcidenta Eŭropo, ĝi estas en dependo kun la ago, kiu ofendas la regulojn de la juro (formala maljusteco de la ago), sed laŭ la anglosaksaj (ankaŭ soveta) vidpunktoj ĝi estas en dependo ankaŭ kun la reguloj de la socia moralo (esenca maljusteco de la ago „a public mischief“¹⁴).

5. La kialojn de la imputebleco, nome unu kondiĉon de la prirespondebleco kaj prava apliko de la punaj sankcioj.

6. La kialojn por malakcepti: kvalifiki iun agon puninda malgraŭ la ekzisto de antaŭkondiĉoj por eldiri punajn sankciojn. Laŭ la juroj de Okcidenta Eŭropo ekzistas kialoj, kiuj ekskludas la maljustan karakteron de la ago, kaj alparte tiuj, kiuj havigas absolvon al la farinto. Sed laŭ la anglosaksa juro tiuj ĉi kialoj estas identaj.

La supre diritaj pri la Internacia Puna Juro respondas al la Puna Juro de la Spaco. Ne nur ĉar ĝi daŭras subiĝi al la Internacia Juro kaj ĝia eventuale alia reguligo povus kaŭzi konfuzon de sencoj, sed ankaŭ ĉar ne estas pravigebla la malproksibiĝo de la principoj.

c) Konsiderante la suprajn, ni povas nun fiksi, eĉ se ĝenerale, la enhavon de la Puna Juro de la Spaco.

Unue ĝiaj bazaj devojiĝoj de la Interna Puna Juro.

1. Anstataŭ la dogmo de la absoluta suvereneco de la ŝtatoj¹⁵ eniras ankaŭ en la Punan Spacan Juron la punrespondeco de la Ŝtato pro ĝiaj spacaj aktivecoj, kiel ankaŭ tiu de ĝiaj civitanoj, ĉu unuope ĉu kolektive agantaj.¹⁶ Sed konektiĝas al tiu demando la limigo de la spaco super la ŝtata tereno, kaj ĉefe de la kosma spaco, trans kiu ĉesas praktike tiu ĉi suvereneco. La afero ne ĉesis esti diskutata ankaŭ dum niaj tagoj,¹⁷ kvankam iom diference ol en la Internacia Puna Juro, rekonigiĝis la libera spacveturado.

2. Koncerne la celojn de la punaj sankcioj, ĉar prezentiĝas kiel antaŭkondiĉo la esploro kaj ĝenerale la aktiveco en la Spaco por pacaj celoj, la koncernaj punsankcioj devas esti regataj de la principo de la speciala prevento, kaj ne de la ĝenerala. Certe, pro manko de sufiĉaj timigaj rimedoj, la tuta klopodo de Puna Spaca Juro devus direktiĝi ĉefe al plifortigo de la konscio, ke la agado en ĉiu spaca aktiveco devas okazi sub reguloj de juro.

3. Rilate la aksiomon ne eblas puno sen ekzisto de leĝoj, kiuj antaŭdifinas ilin, oni devas akcepti (pro la neevoluinteco de la Puna Spaca Juro) ĝian provizoran

preterlason, ĉar ĝi estas la sola maniero alfronti la ankoraŭ ekzistantan realon.¹⁸ Ĉiukaze, kiel perspektivo de la plua evoluo de tiu ĉi juro devas akceptiĝi almenaŭ la regulo; „*neniu krimo sen leĝo*“. (La punindeco de la ago devas esti antaŭvidata en la tempo de ĝia faro, fare de iu ĝenerala regulo de juro.)

4. Pri la „maljusteco“ de la ago ne povas prezentiĝi gravaj kontraŭdiroj pro la specifa signifo de reguloj de la morala ordo. Ago kontraŭ tiuj ĉi moralaj reguloj devas karakteriziĝi puninda pro la perspektivo, ke fine aplikiĝos ankaŭ ĉi tie la konata aksiomo „*neniu puno sen leĝo*“ aŭ aliel, la regforto de la justo.

5. Koncerne la imputadon de la ago al la farinto estas pli ĝusta konsideri la konceptojn de la Okcidenta Eŭropo, kiuj cetere estas la ĉefa baraĵo kontraŭ konfuzo de sencoj pri juro kaj politiko. Interesaj sekvoj de tio ĉi estas: en kazoj de ekzistanta perfido, ĝi estas forĵetebla nur se ekzistas reala kaj leĝa erariĝo; aliparte en kazoj de neglekto, punebla estas la ago, nur se ĝi eksplicite antaŭvidiĝas fare de iu regulo de la juro.

6. Fine, koncerne la kaŭzojn de ĉeso de la punigebleco, pli ĝusta ŝajnas la proksimiĝo ree al la konceptoj de Okcidenta Eŭropo. Tiel ekzistas klara distingo inter la kialoj, kiuj ĉesigas la maljustecon (sindefendo de stato de necesbezono, oficiala ordono ktp.) kaj kialoj, kiuj malakceptigas la imputeblecon (speciala stato de neceso, *moral dilemo*, nome kiam kolizias la interna kaj internacia leĝa ordo ktp.).

Surbaze de la supre eksponitaj ni povus difini: *Spaca krimo estas ago maljusta rilate al la reguloj de la juro aŭ la morala ordo, regantaj la spacan aktivecon, samtempe ago imputebla al ĝia farinto, kiu implicas punajn sankciojn, ĉu pro transpaŝo de tiuj ĉi reguloj, ĉu pro tiuj de la interna juro.*

Al la demando, kiaj agoj estas kvalifikeblaj spacaj krimoj donas kontentigan kontribuon la Publika Aer-
vetura Puna Juro¹⁸ kaj la Internacia Puna Juro²⁰, fine la Konvencio de la Jaro 1937, (ekz. deteno de surterigita spacveturilo, atakoj kontraŭ astronautoj ktp.). Pli longa priskribo superas jam la kadrojn de la nuna artikolo, kaj apartenas al la kompetenteco de la Speciala Puna Juro de la Spaco. Sed ni devas tuŝi tiun kategorion de maljustaĵoj, kiuj eventuale ekostos el la atakoj fare de eble ekzistantaj eksterteraj homaj estuloj. Certe, la ekzisto de supera formo de vivo, kiel estas tiu de la homo, ne konsideriĝas probabla sur la planedoj proksime de ni. Tamen, se ni konsideras en la biologio konatan principon de adaptiĝo de la vivantaj estaĵoj, ĝi ne povas tute eksludiĝi, eble ĉe la plej malproksimaj planedoj de nia sistemo, aŭ ĉe aliaj sistemoj. Ĉiukaze oni komencis alfronti la demandon pri la „difino“ de la senco de la homo. Sed ke oni prijuĝu, kiomgrade tiuj estaĵoj fariĝos subjektoj de la Puna Spaca Juro, restas ekster niaj nunaj eblecoj.

d) Koncerne la aplikon de la Punjuro de la Spaco, ĉefa demando estas la ebleco pri fondo de Internacia Kriminala Spaca Tribunalo. Tiu ĉi demando estas komunka kun la fakto, ke ne funkcias ankoraŭ Internacia Kriminala Tribunalo malgraŭ la faritaj klopodoj.²¹ Malfaciligas la establon la demando pri havigo de ekskluziva kaj deviga kompetenteco, kiu premisas la ekziston

de iu superŝtata potenco. Hodiaŭ kelkaj venis al la konkludo, ke tiu ĉi temo fariĝis premanta kune kun la alia temo, kun tiu de la redakto de internacia kriminal-jura kodo.²² Fronte al la sinsekvaj prokrastoj de decidado pri fondo de tia tribunalo, ankaŭ ni inkludas al la opinio pri la parta solvo de la problemo. Aperas jam konvena oportunece tiucele pere de Eŭropa Konsilio. En ĝi, kiu konsistas el Ŝtatoj-Membroj de preskaŭ samforma civilizo, konsciigas jam la neceso, ankaŭ la ebleco fondi tian tribunalon. Ni aparte citas la favoran propo-

non de Komisiono pri jura kunlaborado, post la konferenco de la jaro 1963, pri kreo de Ĝenerala Eŭropa Tribunalo.

Certe ne fariĝos ebla la solvo de la grandaj spacaj problemoj per fondo de kriminalaj tribunaloj fare de Ŝtatoj, se inter ili ne partoprenos ankaŭ la ĉefaj spacaj potencoj. Ni esperas, ke kia ajn paŝo, kiu cetere estos konforma al la artikolo 70 de la Ĉarto de UN, fariĝos grava ekirpunkto al tio, ke la diritaj problemoj subiĝu al la menciita procezo.

NOTOJ:

- ¹ Vidu pillonge pri tiu ĉi juro: D-ro L. Márton: „Kosma Spaco kaj Juro” en „Internacia Jura Revuo”, 1967, N-ro 3, paĝo 2.
- ² Komparu A. Papakostas: „La Juro de la Spaco”, 1965, p. 9. Jen la freŝdata difino de la Juro de la Spaco laŭ Lochigliani: „La tuto de la juraj reguloj, kiuj reguligas la aktivecon en la Spaco”.
- Vidu G. Lochigliani: „Lineamenti di diritto cosmico”, Milano, 1968, p. 17.
- ³ Komparu: „Concepts and methods in the Law of Outer Space” in Proceedings of the Sixth Colloquium in the Law of Outer Space, Paris, 1963, p. 7. Preskaŭ la sama konkludo finstarigas ankaŭ G. Lodigliani, op. cit. p. I.
- ⁴ Sub tiu ĉi vidpunkto nia opinio devus gvidiĝi ankaŭ la penso de la eminenta Prof. Medina Ortega en Madrid, kiu ĝenerale konsideras kiel internacia krimo ĉiam rilatanta agon ĉu ĝi estas farata en nia Planedo, ĉu en kiu ajn alia. Vidu nian tradukon kun subnotoj de lia artikolo sub titolo: „Al nova sistemigo de la punaj formoj de la Internacia Juro”, en „Arkivo de Leĝoscienco”, greklingve, 1965, n-ro 6-7, p. 325.
- ⁵ Pri kiu vidu tuj sube.
- ⁶ Sendepende de tio, ke dum la reguligo de tiu ĉi neordinara temo embuskas la danĝero, ke miksiĝas la fantazio kun la scienco, des pli, ĉar ni estas parte influataj, kiel estas nature, de la atingajoj de la Teknologio. Vidu Ch. Chaumont: „Le droit de l'Espèce”, eldono de „Que sais-je”, 1960, p. 122.
- ⁷ La difino de la Puna Juro varias en la Interna Juro. Laŭ Prof. D. Karanikas, ĝi konsistas el la juraj reguloj, kiuj difinas la rajton de la ŝtato pri aljuĝo de puno kaj preventaj aranĝoj kontraŭ la krimo. Vidu: D. Karanikas: „Verketo pri Puna Juro”, Ĝenerala Parto — greklingve — 1952, p. 18.
- ⁸ Vidu ĉi-rilate M. S. Jaffe: „Recent Development in the Intern. Law of Space”, en Temple Law Quarterly, 1965, vol. 38, n-ro 3, p. 267.
- ⁹ Kiel p. e. la kazon pri difino de la spaco ekster la nacia regado, kiu spaco konsideriĝas laŭ kelkaj, kiel rekonita laŭkutime (silente) aŭ ankaŭ leĝoscience rilate al la spacveturado (vidu V. Korbos, op. cit.).
- ¹⁰ Rilate al la Aervetura Juro, kiel fonto de Spaca Juro, vidu Ch. Chaumont, vidu sub punkto 8, p. 76.
- ¹¹ Pri la pli preciza senco de tiu ĉi nova termino (en la Internacia Juro) vidu: G. Zotiadis: „La deviga Internacia Juro”, Thessaloniki, 1968, p. 137., 157., 207., 242-244.
- ¹² Komparu A. Verdross: „Volkerrecht”, 1950, p. 7.
- ¹³ Temas pri konata teorio de la „registara akto” aŭ „acte d'Etat”. Komparu P. Papadatos: „La proces d'Eichmann”, 1954, p. 74. kaj A. Papalotis: „La krimo de genocido” (greklingve), Thessaloniki, 1966, p. 30.
- ¹⁴ Komparu G. Mangakis pri la sama temo kiel supre, p. 201, de la sama aŭtoro „Das Unrechtsbewusstsein in Strafrecht”, Schuldlehren, u. s. w. 1954.
- ¹⁵ Evidentan malfortiĝon de tiu ĉi dogmo oni povas konstati lastatempe en la Konvencio pri senarmiligo de Moskvo, 1963, rilate kun la temoj.
- ¹⁶ Pri la puna respondeco de la ŝtato, vidu: A. Papanlotis, op. cit. p. 70, kiu aldone mencias ateste pri tio la opinion

de Prof. Efstathiadis, laŭ kiu en la pozitiva juro ekzistas punsankcioj kontraŭ la ŝtatoj, rekonataj de la Ĉarto de UN. Koncerne la respondecon de la individuoj Prof. Konstantopoulos, op. cit. p. 235, al la demando: ĉu la diversaj organizajoj, la kolektivoj kaj unuopaj personoj konsistigas la subjektojn „de libera suvereneco”, aŭ nur simple la subjektoj de la internacia juro, li respondas principe per akcepto de la lasta, sed kun aldono, ke la koncerna demando bezonas pridiskuton ankaŭ el kompara vidpunkto, kaj citas multajn ekzemplojn de konvencioj, per kiuj koncesiĝis la rajtoj de internacia juro al la individuoj. Plue, sama profesoro konkludas — en p. 513 —, ke la unueca koncepto de la senco de la juro kondukas nin al la evito de troigoj en la kadroj de la internacia juro, ĉefe rilate al la senco de la absoluta suvereneco de la ŝtatoj. Prof. Efstathiadis en sia verko „Internacia Juro”, vol. A, 1950, p. 63, akceptas la individuon en tiu konsidero, kaj en certaj kazoj kiel subjekton de la Internacia Juro. La nombro de la okupiĝantoj pri la Puna Internacia Juro, kiuj akceptas la punrespondecon de la individuo, pli kaj pli grandiĝas. Vidu: P. Papadatos, op. cit., S. Glaser „Introduction á l'étude du droit Intern. Pénal”, 1954, p. 168, kie li parolas pri la anstataŭado de la ideo de suvereneco de la ŝtato, per tiu de la suvereneco de la juro, al kiu transiras ankaŭ la alta destino de la Internacia Puna Juro. Komparu Kelsen: „Peace through Law”, p. 80. Koncerne la funkciadon de Internacia Puntribunalo subtenas lin Helsen, ankaŭ Prof. Saint Hilaire en sia verko p. 88. Laŭ lia opinio ne nur la malvastaj limoj de la tereneco, sed ankaŭ tiuj de la surtera agado jam ŝajnas esti preterlasitaj antaŭ la senfino de la kosmaj celadoj. Li principe akceptas kelkajn vidpunktojn traktantajn la pli ĝeneralan temon de la objektiva respondeco kaŭzata de damaĝoj kaj krimagoj en la Spaco, kiel akceptas la menciita A. Bueckling en sia „Die volkerrechtl. Haftungsklausel der Weltraumsfragen in Zeit. Für Luft- und Weltraumsragen” 1968, vol. I. p. 5.

¹⁷ Vidu A. Meyer „Rechtsprobleme des Weltraums” en ZLW, 1969, p. 11. Okaze de Internacia Konferenco de UN, en Wien, la 14-27. de aŭgusto 1967, li subtenas tion, ke la plej konvena „limo” estas la alteco de 275 000 futoj, ĝi estas konata kiel „limo Karman”.

¹⁸ Laŭ kiu la punindeco de unu ago devas ekzisti dum la tempo, en kiu ĝi estis farata laŭ la Interna aŭ Internacia Juro. Pri la pli nova koncepto, kiu distingas inter krimoj de internacia juro kaj internaciaj krimoj, vidu: A. Papanlotis, op. cit. p. 28. kaj Medina Ortega, menciita verko, p. 322.

¹⁹ Vidu: de J-P. Delmas kaj Saint Hilaire la jam menciitan verkon, p. 84-86.

²⁰ Vidu: Medina Ortega, menciita verko, p. 326 (ĉiuj distingoĵ ĉefe koncernas la krimojn de militoj; krimo kontraŭ la paco, la genocido, marrabado — pli akcentendaj ĉi tie — la nomataj formale internaciaj krimoj ktp.). Vidu ankaŭ tion pri pli ĝenerala distingoĵ de G. Homann „Strafrechtliche pli ĝenerala distingoĵ de G. Hoffmann „Strafrechtliche Verantwortung in Völkerrecht”, Frankfurt, 1962.

²¹ Komparu A. P. Gioti: „La internaciaj krimoj kaj la institucio de la preskripto” en la gazeto „Armenopoulos” 1967, p. 465. kaj A. Papanlotis, op. cit. p. 105.

²² Vidu rilate A. Papanlotis, op. cit. p. 109, kie estas trovebla ankaŭ la opinio pri ĝi de V. Pella.

La sociaj tribunaloj en Germana Demokratia Respubliko

I. Enkondukaj rimarkoj

La konstitucio de Germana Demokratia Respubliko (GDR) validanta ekde la 8-a de aprilo 1968, entenas en sia artikolo 21 la fundamentan rajton de la civitanoj pri krea kunagado demokratia en ĉiuj sferoj de la socia vivo. Unu el la formoj por realigo de tiu fundamenta rajto estas la agado de la sociaj tribunaloj.

La unua eksperimento cele al partoprenigo de civitanaj komisionoj en la justico kaj juĝfarado estis farita jam en 1953 per la establo de konfliktkomisionoj en popolproprietaj entreprenoj kaj administraciejoj. Tiuj konfliktkomisionoj kontentige plenumis siajn taskojn dum pli ol dek jaroj, kaj ilia agado pruviĝis kiel ege efika formo de senpera kolektiva memedukado socia de la laboruloj, speciale ĉe la traktado kaj solvo de laborjuraj konfliktoj. Konsiderante ĉi tiun fakton kaj derante de la atingita stato en la socia evoluo, la Stata Konsilantaro de GDR dekretis en 1963 gravan plilarĝigon de iliaj taskoj, transdonante al ili tiam ankaŭ la traktadon ne negravaj punindaĵoj kaj de malgrandaj civiljuraj konfliktoj. Samtempe la Stata Konsilantaro de GDR dekretis la establon de plia organo de la socia memedukado en formo de arbitraciaj komisionoj agantaj en la loĝkvartaloj kaj transprenantaj ĉe la traktado de negravaj punindaĵoj kaj malgrandaj civiljuraj konfliktoj la samajn taskojn kaj kompetencojn kiel la konfliktkomisionoj.

Estas esprimo por la pozitiva evoluo de tiuj komisionoj kaj konkludo el ĝi, ke la nova konstitucio de GDR firme inkluzivas la konfliktkomisionojn kaj arbitraciajn komisionojn en la unuecan sistemon de la socialisma justico, donante al ili la komunan nomon „sociaj tribunaloj”. La konstitucio fiksas en artikolo 92, ke la juĝfarado efektiviĝas en GDR krom per la Plej Supera Tribunalo, la distrikta tribunalo kaj la subdistrikta tribunaloj ankaŭ per la sociaj tribunaloj en la kadro de la taskoj transdonitaj al ili per leĝo.

La konstitucia karakterizo de la konfliktkomisionoj kaj arbitraciaj komisionoj kiel sociaj tribunaloj praktikantaj juĝfaradon en la kadro de la taskoj transdonitaj al ili per leĝo, samtempe esprimas, ke por ili ankaŭ validas la aliaj konstituciaj principoj pri la tribunalsistemo kaj la agado de la tribunaloj, ekz. la dispozicioj pri la antaŭkondiĉoj plenumendaj de la juĝistoj en demokratia rilato, pri ties elekto, revokebleco kaj devo al raportoj ilian agadon antaŭ la elektintaro, pri la sendependeco en la juĝfarado kaj la ligiteco nur al la konstitucio, la leĝoj kaj aliaj juraj preskriboj kaj pri la rajto de ĉiu civitano esti aŭdata antaŭ la tribunalo.

II. La leĝofontoj rilate al la sociaj tribunaloj

La difinoj pri la taskoj kaj kompetentecoj de la sociaj tribunaloj estas entenataj en la leĝo pri la sociaj

tribunaloj, kiu ekvalidis la 1-an de julio 1968. Ĝi enhavas la fundamentajn regulojn pri la pozicio kaj establo de la sociaj tribunaloj, pri elekto kaj revoko de iliaj membroj, pri ilia labormaniero, pri la kontrolo de ilia agado kaj iliaj decidoj kaj pri pluraj pliaj kompleksoj de pli-malpli administra karaktero. La detalajn dispoziciojn enhavas du ediktoj de la Stata Konsilantaro de GDR datigantaj de la 4-a de oktobro 1968 pri la elekto kaj agado de la konfliktkomisionoj respektive de la arbitraciaj komisionoj.

III. La establo de la sociaj tribunaloj

Laŭ tiuj ĉi juraj preskriboj la sociaj tribunaloj estas elektitaj organoj kaj konsistiga parto de la unueca sistemo de socialisma justico kaj socialisma demokratio. La fakto derivita en la enkondukaj rimarkoj el konstituciaj konsideroj, ke la sociaj tribunaloj estas formo por realigi la rajton de la civitanoj je kunagado en la justico, kaj ke la membroj de tiuj tribunaloj estas sendependaj kaj ligitaj nur al la konstitucio, leĝoj kaj aliaj juraj preskriboj de GDR, estas eksplicite konfirmata en la §§ 1 kaj 2 de la dirita leĝo. Ilia agado devas servi al la garantiado de la socialisma laŭleĝeco kaj kontribuas interalie al la defendo de la rajtoj kaj al la gardado de la leĝe protektataj interesoj de la civitanoj, al la akcelado de la kreaj fortoj de la homoj kaj al la elformado de la sociaj interrilatoj inter la civitanoj en la laborejoj kaj loĝkvartaloj.

1. Establo de la konfliktkomisionoj

La konfliktkomisionoj estas establataj en entreprenoj de ĉiu jura stato (do ne plu nur en popolproprietaj entreprenoj), sed ne en kooperativoj por produktado. En entreprenoj kun pli ol 50 laboruloj la establo estas deviga, en malpli grandaj entreprenoj ĝi estas ebla, se en ili ekzistas entreprena organizaĵo sindikata. En grandaj entreprenoj povas kaj plej ofte devas esti establataj pluraj konfliktkomisionoj. La agadregiono de unu konfliktkomisiono laŭregule ampleksas 300 laborulojn kaj koincidas kun la agadregiono de la respektiva entreprena sindikatestraro. Por ĉiu konfliktkomisiono la laboruloj elektas 8 ĝis 15 membrojn por la daŭro de du jaroj per sekreta balotado. La elekto estas preparata kaj realigita de la entreprena sindikatestraro. La elektotoj estas proponataj kaj pridiskutataj en sindikataj kunvenoj de la laboruloj. La elektitaj membroj elektas el inter siaj vicoj unu membron kiel prezidanton kaj aliajn kiel ties anstataŭantojn.

2. Establo de la arbitraciaj komisionoj

Arbitraciaj komisionoj estas establataj en la loĝkvartaloj de la urboj kaj komunumoj kaj konforme al la necesoj en la kooperativoj por produktado. Respondecaj pri la establo de arbitraciaj komisionoj kaj pri

la fiksado de iliaj nombro kaj agadregionoj estas la lokaj delegitaroj. La membroj de la arbitraciaj komisionoj estas elektataj *por daŭro de kvar jaroj* fare de la lokaj delegitaroj aŭ de la membroj de la kooperativoj laŭ propono de la komitatoj de la Nacia Fronto, respektive de la estraro de la kooperativoj.

La membroj de la sociaj tribunaloj, kies minimuma vivoaĝo estas 18 jaroj, devas esti modelaj laŭ ilia laboro kaj ilia socia kaj persona konduto. Ili devas regule raportii pri la plenumo de la taskoj transprenitaj per la akcepto de la elekto kaj povas esti revokataj de la delegitaroj aŭ membraroj elektintaj ilin, se ili malobeas al la konstitucio aŭ leĝoj aŭ alimaniere malplenumas severe siajn devojn.

IV. La taskoj de la sociaj tribunaloj

La taskoj de la sociaj tribunaloj estas parte la samaj, parte diferencaj por la du specoj de tribunaloj. En la unua okazo la reciproka limigo de la kompetenteco okazas jene: *La konfliktkomisionoj estas kompetentaj, se la kulpigata civitano aŭ la kontraŭulo de la petanto estas laborulo en entrepreno kun konfliktkomisiono.* Aliokaze (t. e., se la kulpigato aŭ la kontraŭulo de la petanto ne laboras en tia entrepreno, ekz. nelaboranta edzino, pensiulo, metiisto) la arbitraciaj komisionoj estas kompetentaj.

1. Komunaj taskoj

La aferoj, pri kiuj ambaŭ specoj de sociaj tribunaloj okupiĝas, estas jenaj:

- deliktoj laŭ la leĝaj premisoj,
- misfaroj,
- kontraŭordajoj laŭ la leĝaj premisoj,
- malobeco al la lerndevo,
- simplaj civiljuraj kaj aliaj jurkonfliktoj.

a) Pri deliktoj la sociaj tribunaloj diskutas kaj decidas, se la kazoj estas *transdonitaj* al ili *flanke de la ŝtataj justicorganoj*. Tia transdono povas okazi, se la faktaro estas komplete klarigita kaj la civitano konfesis sian malobeon al la juro, plie se konsidere al la estiĝintaj sekvoj kaj al la kulpo de la civitano la ago ne estis grave kontraŭsocia, kaj se konsidere al la ago kaj la personeco de la civitano oni povas atendi de la socia tribunalo efikan influon edukon. Speciale taŭgaj por transdono estas deliktoj kontraŭ la socialisma kaj la persona propretoj, korp-ofendoj kaj malobeco al la labor- kaj sanprotekto.

b) Misfaroj estas laŭ la nuna kriminala juro *malatentoj al la proprieto, ofendo aŭ kalumnio kaj rompo de la hejmmrajto en ejoj kaj terposedaĵoj de civitanoj*. Malatento al la proprieto estas misfaro nur, se la ago laŭ la cirkonstancoj (damaĝo, kulpo de la civitano kaj ties personeco) estas bagatela, la kaŭzita aŭ intencita damaĝo ne estas esence pli granda ol 50,— M, kaj temas pri unuafoja ago. Aliokaze ne estas misfaro, sed delikto. La sociaj tribunaloj diskutas kaj decidas pri misfaroj laŭ peto de la civitano trafita de la misfaro, de labor-kolektivo aŭ de domkomunumo, aŭ se la kazo estis transdonita de la polico aŭ alia kompetenta ŝtatorgano.

c) Pri kontraŭordajoj, t. e. *nedisciplinitaj agoj malfaciligantaj la ŝtatan estradon kaj perturbantaj la evoluon* de la socialisma komuna vivo, tamen ne grave ofendantaj la interesojn de la socio aŭ de unuopaj civitanoj, ekzistas speciala leĝo, laŭ kiu la reago al kontraŭordajoj estas afero de la ŝtataj estroj, en kies respondecregiono ili okazas. Sed tiuj ĉi estroj povas transdoni la aferon al la socia tribunalo, se ili opinias, ke konsidere al la karaktero kaj la cirkonstancoj de la kontraŭordajo kaj al la personeco de la kulpigata civitano la eduka kaj preventa influo de la socia tribunalo estas precipa efika.

d) Pri malobeoj al la lerndevo la sociaj tribunaloj diskutas kaj decidas *laŭ peto de la direktoro de la lernejo*, se propraj edukaj klopodoj de la lernejo aŭ de la gepatra reprezentantaro restis senrezultaj. La diskuto okazas kun la gepatroj aŭ aliaj personoj edukrespondecaj, tolerantaj, ke lerndevaj infanoj ne regule partoprenas la lecionojn.

e) La sociaj tribunaloj diskutas pri la paca solvo de jenaj civiljuraj aŭ aliaj konfliktoj, se la faktaro kaj la jura pritakso estas simplaj kaj klarigeblaj per pridemandado de la petanto, de ties kontraŭulo aŭ de aliaj civitanoj:

- *monpostuloj ĝis proksimume 500,— M,*
- *plenumo de jurdevige fiksitaj devoj al vivtenado,*
- *konfliktoj el la malobeco al devoj kaj rajtoj en la ĉiutaga vivo, precipe en la kunvivado en la dom- aŭ loĝkomuneco,*
- *civiljuraj konfliktoj inter entreprenoj kaj laboruloj, respektive inter kooperativoj por produktado kaj ties membroj.*

Se en tiuj okazoj interkonsento de la partioj post la diskutado ne estas atingebla, la sociaj tribunaloj rajtas fari decidon, se la partioj komune petas pri tio.

f) Rezulte de la diskutoj ĵus pritraktitaj la sociaj tribunaloj povas fiksi aŭ konfirmi interalie jenajn disponojn:

- *la devon de la civitano rekompenci la damaĝon, ĉu nature, ĉu per mono,*
- *la devon de la civitano pagi punmonon de 5,— ĝis 50,— M aŭ ĉe deliktoj kaj misfaroj kontraŭ la proprieto ĝis la triobla valoro de la damaĝo, sed maksimume ĝis 150,— M,*
- *la devon de civitano pardonpeti la ofenditon aŭ damaĝiton,*
- *la eldiron de mallaŭdo.*

Krome la sociaj tribunaloj povas konfirmi devontigojn de kolektivoj aŭ unuopuloj rilate la edukon de la civitano kun celo evoluigi la socialisman konscion kaj forigi kaŭzojn kaj kondiĉojn de la konfliktoj. Se la sociaj tribunaloj opinias, ke la civitano en sufiĉa mezuro ekkonis sian eraron kaj jam komencis ĝin supervenki, ili povas rezigni pri disponoj edukaj.

2. Speciala tasko de arbitraciaj komisionoj

Nur la arbitraciaj komisionoj estas kompetentaj rilate la diskutadon kaj decidon pri la konduto de civitanoj, kiuj pro la laborevitemo ne regule laboradas,

kvankam ili estas laborkapablaj. La diskutado okazas laŭ motivita postulo de la prezidantoj de la lokaj konsilantaroj kaj celas la edukon de la civitano, por ke li ŝanĝu sian vivmanieron, regule laboru kaj ekhavu ordigitan vivon. La komisionoj povas fiksi aŭ konfirmi tiaspecajn devontigojn de la civitano, eldiri mallaŭdon aŭ fiksi pagendan punmonon de 5,— ĝis 50,— M.

3. Speciala tasko de konfliktkomisionoj

Nur la konfliktkomisionoj estas kompetentaj por la diskutado kaj decido pri *laborjuraj aferoj*. Tiaj aferoj estas interalie

- konfliktoj pri la fero, ŝanĝo, plenumo aŭ finiĝo de laborkontraktoj,
- konfliktoj pri la ĝusta salajrado, pri la postuloj de la entreprenoj al la laborulo retropagi pagitan salajron kaj pri premioj,
- konfliktoj pri forpermeso kaj alispeca liberigo de la laboro,
- protestoj kontraŭ disciplinaj disponoj de la entreprenita estraro,
- konfliktoj en la kampo de la san- kaj laborprotektado kaj de la subtenado al virinoj kaj neplenaĝuloj,
- efektivigo de edukaj diskutadoj pro malatento al la labordisciplino.

La diskutado kaj decido de tiaj laborjuraj aferoj estas la nepra antaŭkondiĉo por ties plia traktado fare de la ŝtataj tribunaloj. El tio evidentiĝas la graveco de la agado de la konfliktkomisionoj en la sfero de la laborjuro.

Petojn pri diskutado kaj decido de laborjuraj aferoj rajtas fari interalie

- ĉiuj laboruloj de la entrepreno en propra intereso aŭ en intereso de kolektivo lin komisiinta,
- la estro de la entrepreno aŭ lia komisiito,
- la estro de la supera organo ĉe postuloj kontraŭ la entreprenestro,
- la subdistrikta prokuroro.

La petoj pri laborjuraj pretendoj devas precize indiki tiun ĉi pretendon kaj ties juran bazon, detale priskribi la faktojn same kiel la kaŭzojn kaj kondiĉojn de la konflikto kaj nomi la pruvilojn. Se temas pri eduka diskutado pro malatento al la labordisciplino, la peto devas enhavi priskribon de tiu malatento kaj praktikson de la personeco de la laborulo.

La diskutadon pri laborjuraj aferoj antaŭ la konfliktkomisiono partoprenas la petanto, lia kontraŭulo, reprezentantoj de la laborkolektivo kaj de la sindikato kaj aliaj laboruloj kapablaj kontribui al la klarigo de la afero. Se la petanto ne aperas en la diskutado, lia peto estas rigardata kiel reprenita. Se la kontraŭulo de la petanto forrestas senmotivite ankaŭ la duan diskutadon, la konfliktkomisiono povas decidi ankaŭ dum lia foresto, kondiĉe, ke la faktaro estas klarigita kaj la petanto postulas decidon. Aliokaze (t. e. se tiuj ĉi kondiĉoj ne estas plenumitaj), la konfliktkomisiono atestas, ke ĝi ne povis decidi pri la afero. Tiaokaze la pretendoj povas esti prezentataj al la ŝtata tribunalo.

Se en aŭ rezulte de la diskutado la partioj trovas interkonsenton, la konfliktkomisiono konfirmas la in-

terkonsenton, se ĝi estas konforma al la principoj de la socialisma juro. Aliokaze la komisiono devas fari propran decidon pri la pretendo. En kazo de diskutado pro malatento al la labordisciplino la komisiono povas fiksi aŭ konfirmi edukajn disponojn aŭ eldiri mallaŭdon.

V. Protesto kontraŭ decidoj de la sociaj tribunaloj

Se la partioj ĉe laborjuraj, civiljuraj aŭ aliaj juraj konfliktoj, aŭ la civitano kulpigata pro delikto, misfaro, kontraŭordaĵo aŭ malobeo al la lernejo aŭ la petanto en okazo de ofendo, kalumnio aŭ rompo de la hejmranto ne estas kontentaj pri la decido de la sociaj tribunaloj, ili povas *deklari proteston ĉe la loko kompetenta tribunalo subdistrikta*. Tio povas okazi *skribe aŭ en la protokolo de la tribunala kancelario*. Se la kulpigato estas neplenaĝulo, la proteston povas fari ankaŭ la edukrajtigitoj. La protesto devas esti deklarata antaŭ la fino de du semajnoj, post kiam la protestonto ricevis la skribe formulitan decidon de la socia tribunalo.

La prokuroro de la subdistrikto, en kiu troviĝas la socia tribunalo, *povas fari proteston kontraŭ ĉiu decido de la sociaj tribunaloj*. Ĝi devas esti deklarata antaŭ la fino de tri monatoj post la decido, se tiu ĉi entute aŭ parte ne estas konforma al la juro. Por ebligi al la prokuroro la praktikadon de tiu ĉi protestraĵo, kiu estas *esenca formo de kontrolo pri la observado de la laŭleĝeco*, la sociaj tribunaloj estas leĝe devigataj transdoni al la prokuroro kopion de ĉiu decido farita.

Pri la protestoj *decidas la subdistrikta tribunalo*, en kies regiono troviĝas la socia tribunalo. Por la proceduro kaj pri la ebleco kaj formo de plia apelacio validas la ĝeneralaj preskriboj proceduraj.

VI. Ekzekucio de la decidoj de la sociaj tribunaloj

Se necese, la *decidoj* de la sociaj tribunaloj povas esti *realigitaj per rimedoj de la ŝtata potenco*. Pro tio la subdistrikta tribunalo devas deklari la decidojn ekzekucieblaj. Tio okazas laŭ peto de tiu, je kies intereso la ekzekucio devas esti plenumata. Antaŭ ol deklari la ekzekucieblecon, la tribunalo kontrolas, ĉu la decido de la socia tribunalo estis laŭleĝe farita, ĉu la ebleco de protesto ne plu ekzistas kaj ĉu la decido havas enhavon taŭgan por ekzekucio. Se tiuj ĉi kondiĉoj estas plenumitaj, la decido estas deklarata kiel ekzekuciebla sen plua diskutado. Se ekzistas duboj, okazas ankoraŭ diskuto. Se la kondiĉoj ne estas plenumitaj aŭ se la subdistrikta tribunalo konstatas, ke la decido de la socia tribunalo malatentas principojn de la socialisma juro, la peto estas malakceptata per motivita decido. Tiuokaze la pretendo, kiun traktis la decido de la tribunalo, povas esti prezentata al la subdistrikta tribunalo por denova ekzameno kaj decido laŭ la proceduro preskribita por la ŝtataj tribunaloj. Kontraŭ la decido de la subdistrikta tribunalo pri la ekzekuciebleco ne ekzistas protestebleco.

VII. Finaj rimarkoj

La leĝaj preskriboj menciitaj sub II. enhavas ankoraŭ kelkajn reguligojn de ĝenerala karaktero. *Speciale estas fiksita la devoj de la ŝtataj tribunaloj, prokuroro-*

Sociaj tribunaloj en Hungario

La VIII-a kongreso de la Hungara Socialisma Laborista Partio konstatis, ke ŝlosilproblemo de la elformiĝo de universala popola ŝtato estas la ĉiam pli larĝskala disvolvigo de la socialisma demokratio. En socialismo la evoluon de la demokratio montras, ke la sociaj organizoj ĉiam pli intense partoprenas en la agado de la ŝtataj organoj kaj en la kontrolo de la ŝtata laboro. Grava postulo de evoluado de la socialisma demokratio estas, ke ĉiam pli kaj pli larĝaj tavoloj de la loĝantaro kroĉiĝu senpere al la administrado de la publikaj aferoj. Por tio la plej konvenaj estas la lokaj konsilantaroj. Iĝas aktuala la pluevoluigo de la popolkontrola sistemo kaj socia juĝado.

En Hungario ekde 1956 funkcias sociaj tribunaloj. La decido, eldonita de la Ministrokonsilantaro, kune kun la Landa Konsilantaro de Sindikatoj (1041/1956. — V. 30. — MTH), ordonis ĉe ni la establon de sociaj tribunaloj tiucele, ke en la aktiva defendo kontraŭ neglektado de labordisciplino kaj damaĝo de socia proprietaĵo partoprenu ju pli larĝa rondo de la laboruloj.

Laŭ tiu ĉi decido oni devis establi ĉe ĉiu entrepreno, havanta almenaŭ 300 laborulojn, socian tribunalon, kies organizo, direktado kaj kontrolo estis tasko de la sindikatoj. Oni povis prezenti al tiuj sociaj tribunaloj aferojn, kiuj estis en konekso kun neglekto de la labordisciplino, damaĝo de la socia proprietaĵo, enuzina malobservo de reguloj de la socialisma kunvivado, aŭ kun la enuzina kulpado kontraŭ la persona proprietaĵo.

Dum la plenumado de la supremenciita decido, ĉe la industri-entreprenoj kun pli ol 300 laboruloj, establiĝis la sociaj tribunaloj. La laboruloj montras ĉiam pli grandan interesiĝon pri la laboro de la sociaj tribunaloj. La nombro de ĉeestantoj en la unuopaj pritraktadoj ĉiam pli altiĝas kaj ankaŭ ilia aktiveco kreskas. Ĝi estas mezurebla je tio, ke kompare kun la nombro de la uzajn laboruloj ĉiam pligrandiĝas la nombro de tiuj, kiuj partoprenas la traktadon, kaj ke laŭokaze ĝi atingas eĉ plurcentojn. La alparolantoj kuraĝe kritikis — dum la traktado — la sintenon de la procedatoj, akre kondamnas la eraron, la kulpinton, kaj — ne malofte — faras proponon por edukkaraktera dispono.

Laŭ la spertoj la procedoj kaj decidoj de la sociaj tribunaloj tre favore efikas kaj la procedatojn kaj la ceterajn laborulojn de la entrepreno. Tiu ĉi eduka efiko superas eble eĉ la preventan efikon de la proceduroj de ordinaraj tribunaloj, resp. la efikon de la punoj per ili fiksitaj. Ties pruvo estas, ke el inter la personoj, prirrespondigitaj per la socia tribunalo troviĝas recidivulo nur en la plej rara okazo. Tiu ĉi eduka efiko je la ceteraj uzajn laboruloj estas mezurebla per tio, ke en uzinoj, kie oni en bone elektitaj aferoj regule aranĝas socitribunalan procedon, tio ĉi influis favore la firmiĝon de la labordisciplino kaj la staton de la socia propraj-protektado.

Ĝenerale oni elektis *tiajn aferojn, kiuj elvokis vastan interesiĝon inter la laboruloj kaj kiuj estis ĝustigitaj tre konvenaj por la edukado de la tuta kolektivo.* La anoj de la sociaj tribunaloj plenumis sian laboron kun granda entuziasmo, antaŭpreparis konsciencie la pritraktadojn, ili pruvis ĝustan maturecon en la gvidado de la pritraktadoj, kaj enkadre de la jurregulo ordinaraj eldiris la plej konvenan juĝon.

La edikto n-ro 24 el la jaro 1962 metis la socian juĝadon sur novajn bazojn. Ĝi kreis kondiĉojn, pro kies sekvo la anoj de la socio kroĉiĝas senpere al la ŝtata aferaranĝado, kaj per tio okazis ankaŭ la komenca paŝo por elformigi la pli evoluintajn formojn de la socia administrado. Estiĝis formo, per kies helpo la tuto de la laborularo de ĉiu entrepreno, institucio, kooperativo povas partopreni komune en la batalo kontraŭ tiuj, kiuj ofendas la jurregulojn, socialismen moralon kaj kunekziston.

Konsidere, ke la agadsfero de la sociaj tribunaloj signife vastiĝas, diverĝe de la pli frua jurregulo, oni devis determini aliajn taskojn en pli detala kadro: *ilia tasko estas ne nur tio, ke ili eduku la laborulojn por konscia kaj disciplina plenumado de laboro kaj protektado de la socia proprietaĵo, sed ankaŭ tio, ke ili akcelu la reciprokajn respekton de homa digno, proprietaĵo kaj aliaj rajtoj de la laboruloj.*

Dum laŭ la pli frua jurregulo, organizo de sociaj tribunaloj estis deviga nur ĉe entreprenoj, havantaj almenaŭ 300 laborulojn, la nova regulo igas tion deviga

roj, entreprenaj kaj sindikataj estraroj rilate la insturkiadon kaj subtenadon al la sociaj tribunaloj. Per tiuj ĉi dispozicioj estas certigitaj, ke la sociaj tribunaloj ĉiam plibonigas sian agadon kaj ke iliaj membroj pli kaj pli atingas altan kvalifikon por la solvo de iliaj taskoj en la kampo de justico kaj juĝfarado.

Nuntempe agadas ĉ. 20 mil konfliktkomisionoj kun 180 mil membroj kaj ĉ. 5300 arbitraciaj komisionoj kun 56 mil membroj. La konfliktkomisionoj decidas definitive pri proksimume 90 procentoj de ĉiuj laborjuraj konfliktoj. Preskaŭ unu triono de ĉiuj kriminalaj kazoj

(en 1968: 27 637 el entute 100 126) estas transdonataj al la sociaj tribunaloj. En miloj de civiljuraj kaj alispecaj simplaj jurkonfliktoj ili atingas pacan interkonsenton de la disputantaj civitanoj aŭ alian kontentigan solvon.

Ne estas dubo, ke la nova etapo en la agado de la sociaj tribunaloj, enkondukita per la ekvalido de la supre menciitaj leĝoj kaj ediktoj, efike kontribuos al la evoluo de socia kunvivado kaj al la realigo de la rajto de la civitanoj pri kunagado kaj kunrespondado en ĉiuj publikaj aferoj, do al la disvolvigo de reala demokratio.

ĉe ĉiu entrepreno kaj alia mastrumanta organo, kies etato havas pli ol 100 personojn.

Organizo, funkciigo kaj direktado de la sociaj tribunaloj estas tasko de la Landa Konsilantaro de Sindikatoj, sed la opajn sociajn tribunalojn organizas kaj kontrolas la sindikata komitato de la entrepreno. La direktoro de entrepreno, respektive la estro de alia mastrumanta organo havas la devon certigi la necesajn materialajn kaj ceterajn kondiĉojn por la funkciado de la socia tribunalo.

Dum laŭ la pli frua jurregulo la elekto de la sociaj tribunalaĵaj membroj validis por unu jaro, laŭ la nova regulo la laboruloj de la entrepreno elektas la membrojn por du jaroj. La sindikata komitato proponas la kandidatojn el inter tiuj laboruloj kun senpuna antaŭa vivo, kiuj ĝuas la konfidon de la kolektivo, morale estas senripoĉaj kaj kies konduto estas modela. Ankaŭ la laboruloj povas proponi tiajn personojn. Sed ili povas ankaŭ revoki tiun membron de la socia tribunalo, kiu malindigis por tiu mandato aŭ plenumas neglekteme sian taskon.

La membroj de la socia tribunalo ricevas la saman laborjuran ŝirmon, kiel la elektitaj funkciuloj de la sindikato. Tio signifas, ke ilia laborrilato estas ĉesigebla per maldungo nur kun konsento de pli supera sindikata organo, resp. li estas translokeblaj nur kun ties konsento. Samtempe la socitribunala membro en sia agadsfero estas oficiala persono, kio signifas, ke ne nur lia kriminaljura respondeco estas pli alta rilate al eventualaj krimoj, sed li havas ankaŭ rajton je pli alta kriminaljura ŝirmo.

La socitribunalaĵaj membroj mem elektas el inter si la prezidanton kaj vicprezidantojn de la tribunalo. La prezidanto estas devigata de tempo al tempo raporti al la laboruloj de la entrepreno pri la funkciado de la tribunalo, kaj pri la akiritaj spertoj.

La nova jurregulo konsiderinde ampleksigis la agosferon de la sociaj tribunaloj. Krom aferoj, kiuj koncernas la malobservon de labordisciplino kaj reguloj pri la socialisma kunvivado, same kiel la damaĝon de la socia proprietaĵo kaj la enuzine faritajn agojn kontraŭ la persona proprietaĵo, laŭ la nova jurregulo la socia tribunalo povas procedi, en pli larĝa rondo ol ĝis nun, ankaŭ en tiaj krimoj, havantaj malpli grandajn signifon, kiujn la prokuroro aŭ la ordinara tribunalo transdonis al ĝi por prijuĝo. Plue ĝia agosfero etendiĝas ankaŭ por la ekscesoj (regul-malobservadoj), same kiel por la prijuĝo de disputoj, estiĝintaj inter la laboruloj de la entrepreno pro honorofendo, kalumnio aŭ leĝera korp-ofendo, kaj ankaŭ de aferoj materialkarakteraj, valore 1000,— forintojn ne superantaj.

Laŭ la diritaj: agosferon de la socia tribunalo formas aferoj, kiujn prezentis al ĝi

- a) la sindikata komitato,
- b) la prokuroro aŭ la ordinara tribunalo, aŭ
- c) diskutoj estiĝintaj inter la laboruloj de la entrepreno.

a) La sindikata komitato povas prezenti tiujn aferojn al la socia tribunalo, kiuj estas en konekso kun morale malaprobenda vivmaniero; kun malobservo de

labordisciplino; kun malobservo de reguloj pri la socialisma kunvivado aŭ kun regul-ofenda ago.

Al la unua grupo apartenas ties agoj, kies vivmaniero estas drinkema, malmorala, kiuj malzorgas sian familion, ne zorgas pri la edukado aŭ alimentado de sia infano, aŭ rifuzas helpi siajn gepatrojn bezonantajn protekton.

Al la dua grupo apartenas ties aferoj, kiuj ekz. malobservas plurfoje la regulojn pri la labortempo, neglekteme aŭ la materialon malŝparante laboras, aŭ malobservas la regulojn ŝirmantajn la sanon kaj korpan integrecon de la laboruloj.

Al agoj ofendantaj la regulojn pri la socialisma kunvivado apartenas ekz. skandala konduto, egoista rifuzo de helpo, malinda konduto kontraŭ la kunlaboruloj, precipe kontraŭ virinoj aŭ junaguloj.

Fine la sindikata komitato povas prezenti al la socia tribunalo ankaŭ la enuzine faritan agon kontraŭ proprietaĵo, aŭ alian regul-ofendon signifantan ankaŭ disciplinan delikton, se la edukintereso aŭ prevento postulas, ke tiu afero estu pritraktata antaŭ larĝa publikeco de la laboruloj.

b) La socia tribunalo povas proceduri pro krimo nur tiam, se tion iniciatas la prokuroro aŭ la ordinara tribunalo. La prokuroro aŭ la ordinara tribunalo povas transmeti por prijuĝo nur aferojn estiĝantajn pri krimoj, havantaj malpli grandan signifon, kondiĉe, ke la tuto de la cirkonstancoj — kiel graveco de la kaŭzita ofendo kaj maniero de la kulpa ago — ne necesigas iniciaton de kriminala proceduro. Tiaj krimoj estas precipe: krimoj de malpli signifaj, faritaj enuzine kontraŭ la socia kaj personaj proprietaĵoj, damaĝfarado, endanĝerigo kaŭzita en sfero de profesio, senrajta uzado kaj memjuĝado.

c) Kio koncernas la diskutojn estiĝintajn inter la laboruloj de la entrepreno, ili estas klasigeblaj en du grupojn. Al la unua grupo apartenas tiuj honor-ofendoj, kalumnioj aŭ leĝeraj korp-ofendoj, kiujn kulpas laborulo de la entrepreno kontraŭ alia laborulo de la sama entrepreno. Pro tiaj oni komencas la procedon surbaze de plendo de la ofendita laborulo. Li devas prezenti la plendon dum tridek tagoj ekde la kulpago, respektive ekde la sciigo pri la kulpinto.

Al la dua grupo apartenas material-karakteraj diskutoj ne superantaj valoron de 1000,— forintoj, ekestintaj inter la laboruloj de la entrepreno.

Oni devas emfazi en konekso de ambaŭ grupoj, ke en tiaj aferoj la agosfero de la sociaj tribunaloj estas ekskluziva, do oni ne povas prezenti ilin, evitante la sociajn tribunalojn, al la profesiaj juĝistaroj.

La nova jurregulo ne deziris doni detalajojn por la proceduro antaŭ la socia tribunalo. Ĉar tio povus fari eventuale rigida la procedon antaŭ la socia tribunalo. Samtempe ĝi klopodis eligi la malcertecon fontantan el la lakonaj dispozicioj de la pli frua jurregulo, kaj en-havas tial la plej gravajn bazajn dispoziciojn por formi la procedantan konsilantaron, por la traktado de la socia tribunalo, por la konsekvencoj de foresto el la traktado kaj por la decidfaro.

La socia tribunalo procedas kiel tri- aŭ kvinmembra konsilantaro. Prezidanto de la konsilantaro estas la

prezidanto de la socia tribunalo, aŭ la vicprezidanto per li designita. La prezidanto designas la membrojn de la konsilantaro kaj ankaŭ ĝiajn kompletigajn membrojn. Oni devas kunmeti la konsilantaron laŭeble el tiaj personoj, kiuj konas la interesatojn en la afero. Unu membro de la konsilantaro estu laŭeble kunlaboranto de tiuj ĉi interesatoj.

Por la ju pli rapida prijuĝo, kio samtempe signifas certigon de aktualeco, kaj por pliigi la edukan efikon, la jurregulo deklaras, ke *la socia tribunalo devas pritrakti la aferon en 15 tagoj ekde ĝia alveno*, kaj laŭ ebleco oni devas ĝin prijuĝi dum unu pritraktado. Tiun ĉi aranĝas la socia tribunalo ekster la labortempo.

La devo de la procedanta prezidanto estas — kunlabore kun la membroj de la konsilantaro — konvene antaŭprepari la aferon, akiri la necesajn pruvojn, detale informiĝi pri la cirkonstancoj de la afero. Ĉio ĉi certigas, ke la rapideco de la procedo ne estu malavantaĝa. Ankaŭ tio servas igi klaraj la cirkonstancojn, ke la membroj de la socia tribunalo kaj la plejmulto de la partoprenantoj bone konas la prirespondigitan laborulon, eĉ, ofte ankaŭ mem la pritraktatan aferon. La prezidanto devas zorgi pri la alvoko de la interesitaj laboruloj kaj ankaŭ de la atestantoj, li publikigas la lokon, tempon kaj temon de la pritraktado.

Dum la pritraktado — pri kies ordo zorgas la prezidanto — oni devas detale aŭskulti la interesatojn, kaj — post atentigo pri la verdiro — oni devas aŭskulti ankaŭ tiujn, kies informacioj estas necesaj por la klarigo de la afero. Plue oni devas konigi la skribaĵojn, kiuj estas esencaj, kaj la ceterajn pruvilojn. La partoprenantoj povas meti demandojn kaj alparoli al la afero.

Reprezentanto ne estas permesata en la procedo, sed en motivita kazo, pro favoro de la interesatoj, ties familiano rajtas interveni. *La procedon* — en motivita kazo — *povas partopreni socia akuzisto* elektita el inter la kunlaborantoj, kaj *ankaŭ socia defendanto*.

La socia tribunalo — post kiam ĝi igis klaraj la cirkonstancojn de la afero — *faras sian decidon en nepublika interkonsiliĝo per voĉplimulto* kaj anoncas ĝin la prezidanto. La decidon oni devas fari skribe kaj la prezidanto kiel ankaŭ la membroj de la konsilantaro devas ĝin subskribi. En la decido oni devas indiki la nomon de la socia tribunalo, la lokon kaj tempon de la traktado, la personajn indikojn de la prirespondigitaj laboruloj, respektive de la laboruloj interesataj en la materialkarakteraj diskutoj, la faritajn disponojn kaj ties kurtan motivigon, kaj — aludante al la pruviloj — la konstatitajn faktojn.

Laŭ la jurregulo de 1956 la socia tribunalo povis *puni la laborulon per busa mallaŭdo aŭ per skriba riproĉo*, respektive ĝi povis *proponi al la entreprena direktoro translokigon de la laborulo en pli malaltan laborkampon, aŭ maldungon kun tuja validi*, ĝi povis *eventuale iniciati kontraŭ li kiminal-procedon kaj kompencon de la kaŭzita damaĝo*.

La nova jurregulo larĝigis la rondon de la fareblaj disponoj. Nome, krom la menciitaj, la socia tribunalo povas *disponi* pri la detiro *de la plej baldaŭ elpagenda gajnokontigento*, aŭ povas *ekskludi* la prirespondigitan laborulon por fiksita tempo — sed maksimume por unu

jaro — *el partoprenigo de premio*, kiun la direktoro rajtas doni de tempo al tempo.

La socia tribunalo povas *puni laborulon, prirespondigitan pro honor-ofendo, kalumnio aŭ leĝera korpofendo, same kiel pro krimo de bagatela signifo aŭ regul-malobservo, ankaŭ per monpuno ĝis 500 forintoj*.

La socia tribunalo povas apliki ankaŭ plurajn disponojn kontraŭ la prirespondigita laborulo en la sama decido. La jurregulo ebligas al la socia tribunalo publikigi sian disponon per la anoncibulo, murgazeto aŭ uzina gazeto.

Apud la ĝeneralkarakteraj disponoj nun menciitaj, kaj ligite al ili, la socia tribunalo povas fari ankaŭ *trispacialan disponojn*, t. e.: ĝi povas *devigi la prirespondigitan laborulon al kompenspago*, aŭ povas ordoni, ke li *riparu la difektitan ajon per propra laboro*. Sed la sumo de kompenspago en nenia kazo povas superi 1000,— forintojn.

La dua speciala dispono servas la celon de la kontraŭalkoholisma batalo, t. e. la socia tribunalo povas *proponi al la magistrato* (sanitara fakadministracia organo de la konsilantara plenumkomitato), ke ĝi *devigu la alkoholiston al trud-detira flegado*. Tiu ĉi dispono *kroĉigas al tiu jurregulo* (dekreto n-ro XVIII. el 1962), laŭ kiu la menciita konsilantara organo povas devigi al partopreno de deviga detir-flegado *en ambulanc-instituto* tiun alkoholiston, kiu per sia konduto, povas kaŭzi la renversiĝon de sia familia vivo, malhelpas la moralan evoluon de sia infano, endanĝerigas la sekurecon de sia ĉirkaŭaĵo, aŭ ofte ĝenas la publikan ordon, resp. la laboron en sia laborloko.

La tria speciala dispono ebligas *asigni por lia familio*, al mano de iu familiano aŭ zorganto de lia infano, *parton de la salajro kaj alia ricevaĵo de la laborulo* malzorganta la alimenton de lia familio.

Se la procedo ekiĝis pro honor-ofendo, kalumnio aŭ leĝera korp-ofendo, la socia tribunalo devas provi la pacigon ankaŭ jam komence de la traktado. Tiucele ĝi povas alvoki la prirespondigitan laborulon, ke li pardonpetu la ofenditon kaj kompensu la kaŭzitan damaĝon.

En la material-karakteraj diskutoj ĝi devas ankaŭ klopodi, ke la debitoro surpronu memvole la kvitigon de la ŝuldo, aŭ plenumu konforme.

Povas okazi, ke la ago ne estas imputebla je ŝarĝo de la laborulo. En tia okazo la socia tribunalo ĉesigas la procedon. La dispono estas preterebla ankaŭ en tiu kazo, kiam la socia tribunalo konstatas ja la respondecon de la laborulo, sed ĝi konsideras, ke la pritraktado de la afero per si mem — sen verdikto — atingis la deziritan celon. Tiu ĉi dispono de la jurregulo baziĝas sur tiu praktika sperto, ke la laboruloj pli hontas antaŭ la socia tribunalo, kies membroj elektigas el inter iliaj kunlaborantoj, ol antaŭ la ordinara juĝistaro, kaj tiel la pli milda dispono de la socia tribunalo, eĉ kelkfoje la nura pritraktado de la afero — sen verdikto — kaŭzas pli efikan edukan influon, ol la pli severa puno de la profesia juĝistaro.

Se prezentiĝas dum la pritraktado tiaj cirkonstancoj, laŭ kiuj kriminala proceduro ŝajnas esti motivita, la socia tribunalo transmetas la aferon al la prokuroro. Kaj se la material-karakteraj diskuto estas pli komplika,

la socia tribunalo povas ĝin transmeti — por aranĝo — al la distrikta juĝistaro.

En okazo de disciplina delikto la socia tribunalo povas proponi al la entreprena direktoro translokigi la laborulon en pli malaltan laborsferon, aŭ lian maldungon kun tuja valido. La ceterajn disciplinajn punojn, difinitajn en la Laborkodo, do la buŝan mallaŭdon kaj la skriban riproĉon ankaŭ li mem povas fiksi. Se la entreprena direktoro ĉeestas la pritraktadon de la socia tribunalo kaj konsentas kun la menciita propono, li povas tion ĉi senprokraste komuniki. En mala okazo li decidus pri la disciplina prirespondigo de la laborulo surbaze de la traktad-materialo, sed la propono ne ligas lin. Ĉiuokaze li devas verdikti la disciplinan decidon dum ok tagoj ekde la komuniko de la socitribunala decido, kaj pri tio sciigi la socian tribunalon.

Ekzistas du formoj de la jura riparo kontraŭ la decido de la socia tribunalo: la unua — ĝenerala — estas la plendo, la alia — escepta — la revizia peto.

Kontraŭ la decido dum ok tagoj post ĝia komuniko oni povas prezenti plendon ĉe la sindikata komitato. Surbaze de tiu ĉi plendo la sindikata komitato povas iniciati la revizion de la socitribunala decido. Ĝi povas fari tion ĉi ankaŭ sen prezento de plendo, se ĝi ne konsentas kun la decido de la socia tribunalo. Sekve de tiu ĉi iniciato la socia tribunalo devas komenci dum ok tagoj novan traktadon, kaj laŭ ties rezulto ĝi povas persisti ĉe sia pli frua decido, aŭ tiun ĉi ŝanĝi.

La alia formo de la jura riparo estas la revizia peto. La prirespondigita laborulo povas peti revizion de la socitribunala decido ĉe la distrikta juĝistaro, se la socia tribunalo punis lin pro krimo per pli severa dispono ol riproĉo, aŭ ordonis asigni parton de lia salajro al iu familiano aŭ zorganto de lia infano, aŭ devigis lin al kompenspago. Ankaŭ tiu estas rajtigita je revizia peto, kiu — kiel ofendinto — partoprenis en afero komenciĝanta pro honor-ofendo, kalumnio aŭ leĝera korp-ofendo. Ĉiu procesulo rajtas peti la revizion de la decido pri materiala karakterata diskuto ekestiĝinta inter la laboruloj de la entrepreno.

La distrikta juĝistaro decidus definitive surbaze de la revizia peto. Ĝia decido povas esti — laŭ la objekto de la afero — diverskarakterata. Tiel ekzemple: kiam li trovas motivita fiksi edukon laboron aŭ malliberigon, li senvalidigas la socitribunalan decidon kaj transmetas la aferon al kriminala proceduro. Aliparte, kiam li konstatas, ke la ago, servanta kiel bazo de la proceduro, ne estas imputebla je ŝarĝo de la laborulo, ĝi ĉesigas la procedon. En motivita kazo ĝi povas preteri la disponojn de la socia tribunalo, rilatantajn al parto de salajro de la laborulo, kaj ĝi povas ŝanĝi la decidon pri la kompenspago. Se la suferanto de la honor-ofendo, kalumnio aŭ leĝera korp-ofendo turnas sin kun revizia peto kontraŭ la decido, la distrikta juĝistaro povas fari ĉiujn disponojn, kiujn la socia tribunalo rajtis apliki, sed ĝi ne rajtas ŝanĝi la sumon fiksitajn de la socia tribunalo, nek la mezuron de la deprenado de gajn-kontingento aŭ premio.

Kompreneble la distrikta juĝistaro havas eblon rifuzi la revizian peton, nome se li trovas ĝusta la decidon de la socia tribunalo.

Por certigi la ekzekucion de la decido de socia tribunalo, la nova jurregulo preskribas, ke la entrepreno devas zorgi pri la ekzekucieblo de la decido tiukaze, se la devigito ne plenumas ĝin dum difinita tempo. La monpunon, kompenspagon kaj la aliajn pagendaĵojn oni devas depreni de la salajro de la laborulo. La sumojn deprenitajn kiel *monpunoj*, oni devas dediĉi por kulturaj kaj socialaj celoj de la laboruloj de la entrepreno.

Okaze de plendo aŭ revizia peto, ne povas okazi ekzekucio ĝis la fina solvo de la afero, sed la asigno de salajro-parto por iu familiano aŭ prizorganto de infano devas okazi senprokraste, sendepende de eventuala plendo aŭ revizia peto.

La leĝecon de la socitribunala funkciado certigas, ke la *prokuroro devas priatenti la observon de laŭleĝeco ĉe la sociaj tribunaloj*, kaj se li spertas mankojn, li devas atentigi kaj doni helpon por korekti la erarojn. La ordinaraj juĝistaroj devas akceli tiamaniere la ju pli bonrezultan funkciadon de la sociaj tribunaloj, ke ili komunikas siajn spertojn akiritajn dum la reviziado de la decidaj al la sociaj tribunaloj, kaj samtempe ili atentigas ilin pri la ĝustaj metodoj. Cetere la ŝtataj organoj kaj entreprenoj, la sociaj organizaĵoj, same kiel la juraj konsilantoj kaj la juran laborkampon prizorgantaj laboruloj de la kooperativoj estas devigataj ĉiurilate helpi la agadon de la sociaj tribunaloj.

La Landa Konsilantaro de la Sindikatoj eldonis detalajn regulojn por establo, organizado kaj funkciado de la sociaj tribunaloj (n-ro 56/1962. SZOT Eln. hat.), kaj la justicministro reguligis per dekreto la taskojn apartenantajn al la ordinaraj juĝistaroj.

Surbaze de la nova jurregulo pri la sociaj tribunaloj, kiu ekvalidiĝis la 1-an de januaro 1963, en okazo de ekzisto de leĝaj premisoj oni estigis ĉie ĉe la ŝtataj entreprenoj kaj aliaj mastrumadaĵoj organizoj la sociajn tribunalojn, kaj — en malpli granda mezuro — jam estigis sociaj tribunaloj ankaŭ ĉe organizoj de terkultura kooperativoj. Unu el la kondiĉoj de bona funkciado de la sociaj tribunaloj estas, ke la kompetentuloj: ekonomoj, sindikat-funkciuloj, kaj precipe la socitribunalaĵaj prezidantoj kaj vicprezidantoj iĝu klarvidaj pri la celo, bazaj principoj de la sociaj tribunaloj kaj proceduraj ordonoj certigantaj la leĝecon. Tiun ĉi celon servis la diversgradaj kursoj.

La sociaj tribunaloj pritraktis jam plurmil aferojn dum la pasinta tempo, kaj la principo de la konvena elektado validiĝis ĉiam pli bone.

Antaŭ la socian tribunalon venas plejparte la labor-disciplinaj aferoj. Al tio apartenas la nemotivita foresto de la laborulo, la senrespekta konduto kontraŭ la estroj, kaj ties inverso: la brutala traktmaniero kun la subuloj aŭ metilernantoj. Plue tien ĉi apartenas la damaĝigo, la fuŝfarado, la misuzo ĉe la uzina mangantigo kaj la malobservo de la laborprotektaj reguloj. Estas konsiderinda ankaŭ la nombro de tiuj aferoj, ĉe kiuj la prirespondigita persono malobservis la regulojn de la socialisma kunvivado. Inter tiuj ĉi oni prirespondigas plejofte la drinkulojn kaj tiujn, kiuj ne zorgas pri sia familio. Pli ofte aperas antaŭ la socia tribunalo malobservoj de normoj, kulpitaj kontraŭ la socia posedaĵo

en la uzino. Ĉiam pliĝas la nombro de tiu aferoj, kiujn la *prokuroro transdonas al la socia tribunalo por prijuĝo*: tiaj estas ekzemple la *aferoj ekiĝintaj pro vestiĝeaj ŝteloj kaj trompo pri la tagsalajro dum malsano*.

La spertoj montras, ke la procedaro de la sociaj tribunaloj funkcias ĝenerale laŭ la postuloj de la leĝeco, kaj nur tre malofte okazas malobservo de procedaj reguloj. Ankaŭ la juraj disponoj pri akcelado de la procedo validiĝas konvene: en plejmulto de la kazoj la traktado okazas en 15 tagoj de alveno de la afero al la socia tribunalo.

Estas tre interese, ke — apud la jure regulitaj procedaj formoj kaj disponeblecoj — la praktiko klopodas treti ankaŭ novajn padojn. Tiel ekzemple: krom tio, ke en kelkaj kazoj jam partoprenis ankaŭ socia akuzanto kaj defendanto, plurfoje okazis t. n. socia garanti-surpreneno. Tio signifas, ke ekzemple: la sindikat-konfidulo, aŭ la laborbrigado aŭ la senperaj kunlaborantoj surprenas la traedukadon de la prirespondigito.

Inter la disponoj, aplikitaj per sociaj tribunaloj, la *atentigo kaj la riproĉo estas la plej oftaj*. La sociaj tribunaloj tre efike aplikas la partan retenon de la gajnkontingento, aŭ la provizoran ekskludon el la premio. La propono: apliki devig-detiran flegadon ĉe la drinkuloj efike kontribuas al la kontraŭalkoholisma batalo, dum la asigno de salajro-parto al la edzino, alia familiano aŭ prizorganto de la infano certigas la kontentigon de la elementaj familiaj bezonaĵoj. Tiuj ĉi disponoj sendube kontribuas por la pliigo de eduk-efiko de la sociaj tribunaloj procedoj kaj decidoj.

La aferoj pri honor-ofendo, kalumnio kaj leĝera korp-ofendo finiĝis ofte per repaciĝo, sed pli ofte oni aplikis punpagon.

La material-karakteraj aferoj venis ankoraŭ en sufiĉe malgranda nombro antaŭ la sociajn tribunalojn.

Sed la spertoj montras, ke la ŝuldantoj ĝenerale memvole surpronis la pagon de la ŝuldo.

Starigante la plej mildajn sankciojn kontraŭ la plej severaj, ni povas ricevi tre interesan bildon. Nome la sociaj tribunaloj *tre ofte aplikas la admonon*, eĉ plurfoje okazis preterlaso de ia ajn dispono (en kazoj, se la nura traktado ŝajnis certigi la ĝeneralan edukadon de la prirespondigito kaj la kolektivo), male la maldungon proponis la socia tribunalo plej rare. Montriĝis, ke eblas pli efike eduki la prirespondigiton en tiu medio, kie li kulpis, do kiam li ne elŝiriĝas el la kolektivo, kaj ne iras al alia laborloko.

La leĝecon de la sociaj tribunaloj decidoj pruvas, ke la Sindikata Komitato ordonis revizion el propra iniciato en apenaŭ 1—2% -oj de la aferoj, kaj la nombro de la plendoj ne estas multe pligranda. Relative pli ofta estas la distrikt-juĝistara revizia peto: ĝi etendiĝas je 4—5% -j de la aferoj, sed plej ofte ankaŭ ili estas senbazaĵaj.

La help-aktiveco de la profesiaj juĝistaroj evidentiĝas ankaŭ en tio, ke ekz.: *la juĝistoj helpas ĉe la antaŭpreparo de la aferoj*, ĉeestas — kiel aŭskultantoj — la traktadojn, post ties fino ili komunikas siajn spertojn precipe en tiuj aferoj, kiujn la profesia juĝistaro transmetis al la socia tribunalo. Ĝenerale *la juĝistoj kaj prokuroroj kontaktiĝas strikte kun la sociaj tribunaloj*, kaj *tiu ĉi patronado estas grava garantiĝo por la bonrezulta kaj laŭleĝa funkciado de la sociaj tribunaloj*.

Resume: surbaze de la ĝisnunaj spertoj estas konstatabla, ke la disponoj de la nova jurregulo montriĝis taŭgaj, la procedo de la sociaj tribunaloj, la tuta aranĝo de la traktadoj kaj disponoj elektitaj kun ĝusta diferencio, ĉio ĉi kaŭzas kaj al la prirespondigito kaj al la tuta kolektivo edukan efikon, ne kompareblan kun tiu de la ŝtadministra, aŭ kutima juĝistara procedo.

D-RO DRAGAN DIMITRIJEVIC RUSSCHITTY
jura referanto (Tuzla)

Favora kalkulo de la dejor-tempo en Jugoslavio

Nova modifo de la leĝo pri la pensio grave plibonigis la tiel nomatan favoran kalkulon de la dejor-tempo en Jugoslavio. Tiamaniere multaj laboristoj en Jugoslavio pli facile kaj pli rapide povas plenumi la kondiĉojn de la pensumado. Ĉiuj laborlokoj, en kiuj oni devas konsideri la favoran daŭron de la plenumita dejoro estas determinitaj en aparta leĝo sub la nomo: Leĝo pri la laborlokoj, kie validas la favora tempokalkulo de la dejorduro. La materialo en la leĝo estas disdividita laŭ laborbranĉoj kaj la branĉoj laŭ la opaj laborlokoj. La citita leĝo koncernas la branĉojn: ĉiuj specaj minejoj, ferfabrikoj, koaksigejoj, metalurgio, ĝis-gejoj, maraj ŝipkonstruejoj, farmacia industrio, trafiko, radiologio, arta agado, ktp., ktp. Anstataŭ unu efektiva

laborjaro al la laboristo povas esti kalkulata dekkvar ĝis 18 monatoj. Tio dependas de graveco de la laborloko kaj ĝia efiko al la sano de la laboristaro. Do, okaze la laboristo povas ricevi por unu jara laboro unu kaj duonon por pensio. Interesa estas la normo koncerne la laboron de baletistinoj kaj baletistoj. Ili ricevas por unu jaro unu kaj duonon. Operaj kantistoj ludantaj gravajn rolojn, ricevas por unu jaro dekkvin monatojn. La listo de la laborlokoj ne estas definitiva. Unuopuloj kaj kolektivoj estas rajtigataj postuli envicigon. Nome speciale tiuj, kiuj havas laborlokojn kun limigita laboro daŭro. Ankaŭ tiuj, ĉe kiuj pro streĉo de laboro rapide sekvas fiziologiaj damaĝoj.

La parlamento en Hungarujo

1. Unuĉambra kaj plurĉambra sistemoj

La plej supera ŝtatpotenca-reprezenta organo de la Hungara Popolrespubliko estas la *unuĉambra parlamento*, kiu unuece esprimas la popolsuverenecon.

El la unueca potenckonstrukturo de la socialisma ŝtato laŭnecese sekvas, ke sur ĝia supro devas esti organo, kiu estas en hegemonia pozicio super ĉiuj aliaj organoj, kiu havas kvazaŭ potenckonstrukturon kaj el tio rezultas ankaŭ tio, ke ĝi rajtas altiri al si la agadsferon de kiu ajn organo.

La situacio de la parlamento en la burĝaj ŝtatoj en tio diverĝas — ĉefe ekde la komenco de la XX-a jarcento —, ke ĝia funkcio pli kaj pli limiĝas al leĝfarado kaj kelkaj malpli gravaj rajtoj. La parlamento apenaŭ sciis influi la politikon de la publika administrado aŭ tiun de la registaro. Post la malapero de la teorio de franca Montesquieu, pri la potenckonstrukturo anstataŭ parlamentismo laŭgrade validiĝas la ideo de „*publikadministrada ŝtato*”, kaj tiu ĉi evoluo indikas la intensan malpliigon de kontrolo agosfero de la parlamento: la registaroj ĉiam pli kaj ofte ricevas longtempan rajtigon al eldono de la necesdekretoj sen parlamenta leĝdono. La „*konstitucia defenda*” rolo de la juĝistaroj — almenaŭ tiu de la plej altaj kortumoj — plu malvastigis la leĝdonan monopolon kaj hierarĥian superecon de la parlamento.

La organizo de la leĝdonaj organoj estas duspecaj en la burĝaj ŝtatoj: unuĉambra kaj duĉambra sistemoj. Sekve de la *duĉambra sistemo* ĝenerale malaltiĝas la rajtoj kaj aŭtoritato de la ĉambroj, kiun estigis senpere la elektantoj. La dua ĉambro des pli forte servas la socian, ekonomian reprezentadon de la reganta klaso. En Anglio la domo de Lordoj estas institucio de la aristokrataro kaj ĉefpastroj, kvankam dum la lastaj jardekoj oni malpliigis ties agosferon, tamen ĝis niaj tagoj ne fariĝis ĝia influo sensignifa je la ŝtata kaj socia vivo. Kaze de senata organizaĵo, la senato konsistas el reprezentantoj de la diversaj burĝaj organizaĵoj (ekz.: en Bavarujo), la sistemo de federacia konsilio venigas en la senaton la reprezentantojn de la registaroj (plej supera ŝtata administrada organo) de la unuopaj ŝtatoj kreantaj la federacion (ekz. Germana Federacia Respubliko).

La agosferon de la dua ĉambro ĝenerale oni tiel fiksis, ke per tio oni ekvilibras la rajtojn de la malsupra ĉambro, konsistanta el la elektitaj deputitoj. Ekz. en la Germana Federacia Respubliko, laŭ Art. 81 alin. 1—2. de la bazleĝo, la federacia prezidanto rajtas ordoni pri t. n. leĝdona necesstato. En tia kazo, tiun proponon de la federacia registaro, kiun la malsupra ĉambro (federacia asembleo) jam dufoje rifuzis, se ĝin aprobas la supera ĉambro (federacia konsilio), la federacia prezidanto rajtas proklami kiel leĝon. En Usono el inter du

ĉambroj nur la dua ĉambro — la senato — havas agosferon en eksteraj politikaj aferoj.

La plej superaj ŝtatpotencaj organoj de la socialismaj ŝtatoj ĝenerale estas unuĉambraj. Soveta Unio, kie la federacia konstrukturo faris tion necesa, establis duĉambran tufederacian Plej Superan Soveton laŭ la Konstitucio de 1936 por plivastigo de rajtoj de la nacioj. Apud la Federacia Soveto, proporcie elektita per senpera balotrajto funkcias la samranga Soveto de Nacioj, en kiun same per senpera balotrajto sendas — sendepende de nombro de la loĝantaro kaj en nombro de finitaj fare de la Konstitucio — siajn deputitojn la federaciaj respublikoj, aŭtonomaj respublikoj, aŭtonomaj regionoj kaj naciaj teritorioj. — Laŭ la Konstitucio de Jugoslava Socialisma Federacia Respubliko la plej alta potencorgano konsistas el pluraj ĉambroj, nome Federacia Konsilio (deputitoj de la vilaĝoj kaj respublikoj), Ekonomia Konsilio, Kleriga-Kultura Konsilio, Sociala Sanitara Konsilio kaj Politika-Organiza Konsilio. Tiuj deputitoj de la Federacia Konsilio, kiujn la Plej Superaj Organoj de la respublikoj, aŭ de la aŭtonomaj provincoj sendis en la konsilion, kreas la Konsilion de la Popoloj.

2. Fundamentoj de la agosfero de la parlamento

La parlamento estas direktanta organo, situanta sur la supro en la organizo de la hungara ŝtato. Ĉiu ŝtata organo pere aŭ rekte estas subordonita al ĝi. La akto de la parlamento establas ĉiujn aliajn organojn de la centra ŝtata organizaĵo, ŝtatpotencan, ŝtata administradan, juĝistaran, prokuroran organojn. Ĝi elektas

- a) la Prezidan Konsilantaron de la Popolrespubliko (Art. 19 alin. 1 de la Konstitucio);
- b) la Ministrokonsilantaron (Art. 23 alin. 2);
- c) la Plej Superan Juĝistaron — Kortumon — (Art. 38 alin. 3);
- d) la plej ĉefan prokuroron (Art. 43 alin. 1).

La tiel establitaj organoj certigas la nerektan direkt- kaj gvidrajtojn de la parlamento super la subordonitaj, respektive malaltgradaj organoj.

La parlamento faras la plej gravajn normojn: la konstitucion, kaj la ceterajn leĝojn. Per tiuj ĉi leĝoj ĝi reguligas la funkciadojn de la tuta ŝtata organizaĵo kaj la plej gravajn rajtojn kaj devojn de la civitanoj.

En la socialisma ŝtato principe la *pleno de la potenco* estas en la manoj de la plej supera ŝtatpotenca-reprezenta organo. Ties kaŭzo estas, ke tiu ĉi organo estas la sola, kiun dum la elektoj la tuta laboranta popolo (respektive ties balotrajta parto) establas. Tiel do ĝi estas la reprezentanto de la tuta laboranta popolo. Laŭ Art. 10 alin. 2 de nia Konstitucio „*la parlamento plenumas ĉiujn rajtojn devenantajn el la popolsuveren-*

eco". La laboranta popolo transdonas sian plenan potenceon al la parlamento. Do la elekto: a) *establas la parlamenton*, b) *transmetas la plenumon de ĉiuj rajtoj devenantaj el la popolsuvereneco* al la parlamento. Tamen la parlamento fakte ne plenumas ĉiujn rajtojn devenantajn el la popolsuvereneco, sed ĝi racie dividas ties plenumon inter la organoj establitaj por tiu celo: centraj kaj lokaj ŝtatpotencaj, ŝtataadministradaj, juĝist- araj, prokuroraj, produktaj ktp. organoj. Tiuj organoj plenumas la rajtojn, kiujn la parlamento transmetis en kadro de la konstitucio aŭ de aliaj leĝoj. La transdono okazas konforme al la donitaj politikaj rilatoj, sed relative firme por pli longa tempo. Tiun stabilecon certigas tio, ke la transmeto okazas per leĝo. Tiel la ŝanĝo de la agosferoj povas kaŭzi signifajn diskutojn kaj ĝi devas esti motivita. La bazojn de la agosfero-transmeto entenas la konstitucio mem. La agosferon de la parlamento laŭ maniero de ĝia plenumo ni povas dividi en tri partojn:

a) *ĝenerala agosfero* (Art. 10 alin. 2 de la Konstitucio), kiu aludas al absoluteco, respektive nelimigebleco de la rajtoj de la parlamento (ĝi rajtas altiri al si kiu ajn aferojn),

b) *ekskluziva agosfero* (en tiuj rajtoj, kiujn laŭ la konstitucio alia organo ne rajtas plenumi, kaj kiujn sen modifo de la konstitucio eĉ la parlamento ne rajtas transmeti al aliaj organoj),

c) *eksplicita agosfero* (en tiuj rajtoj, kiujn la konstitucio eksplicite denombrias, tamen, kiuj ne en ĉiu kazo estas ekskluzivaj, ĉar la Prezida Konsilantaro laŭ Art. 20 alin. 4 de la Konstitucio rajtas procedi en la plej multo el inter ili, inter la sesioj de la parlamento).

3. Ekskluziva kaj eksplicita agosfero de la parlamento

La *ekskluzivan agosferon* de la parlamento pleje fiksas la konstitucio mem. Sed en aliaj kazoj el la karaktero de la agosferoj sekvas tio, ke nur la parlamento rajtas procedi en ili. Jen:

a) *modifo de la Konstitucio* (Art. 20 alin. 4 de la Konstitucio),

b) *elekto de la parlamentaj funkciuloj* (prezidanto, du vicprezidantoj, ses protokolantoj; Art. 12 alin. 3),

c) *elekto de la komisionoj de la parlamento* (Art. 17 alin. 1 kaj Art. 13 de la Rezolucio N-ro 2/1956 de la parlamento),

d) *fikso de la agadreguloj de la parlamento* (Art. 12 alin. 5),

e) *decido pri valideco de la elektoj kaj mandatoj* (Lego III. de 1966 kaj Art. 5 alin. 3 de la agadreguoj de la parlamento),

f) *disigo de la parlamento antaŭ la finiĝo de sia mandato* (Art. 18 alin. 1),

g) *plilongigo de ĝia mandato okaze de milito aŭ de aliaj eksterordinaraj cirkonstancoj* (Art. 18 alin. 2—3),

h) *konstato de neakordigebleco ĉe la parlamenta deputito* (Art. 11 alin. 3 kaj Art. 53 alin. 3 de agadreguloj de la parlamento),

i) *elekto de la Prezida Konsilantaro de Popolrespubliko* (Art. 10 alin. 3 punkto d),

j) *revoko de la Prezida Konsilantaro aŭ ties kiu ajn membro* (Art. 21 alin. 3).

En la menciitaj agosferoj anstataŭ la parlamento neniu alia organo rajtas agadi eĉ ne la Prezida Konsilantaro, anstataŭanta la parlamenton inter ĝiaj sesioj.

La Konstitucio ne denombrias la t. n. *eksplicitajn agosferojn*, en kiuj — kvankam ne inkluzive, sed tamen kutime procedas la parlamento (ekz. akcepto de la budĝeto kaj plano). Nur la Prezida Konsilantaro de la Popolrespubliko rajtas transpreni tiujn rajtojn, escepte la menciitajn ekskluzivajn agosferojn.

La *eksplicitaj agosferoj* estas:

a) *difino de la organizo, direkto kaj kondiĉoj de la regado* (Art. 10 alin. 3),

b) *difino de la ŝtata budĝeto* (Art. 10 alin. 3 punkto b),

c) *fikso de la popolekonomia plano* (Art. 10 alin. 3 punkto c),

d) *establo kaj ĉesigo de la ministerioj, difino kaj modifo de ilia taskosfero* (Art. 10 alin. 3 punkto f),

e) *praktiko de amnestio* (Art. 10 alin. 3),

f) *normigo de priespondigo de la membroj de registaro* (Art. 36 alin. 2),

g) *la escepta difino de la juĝistara organizo* (Art. 37),

h) *arango de la elekto de juĝistoj de departementaj kaj distriktaĵ juĝistaroj* (Art. 39 alin. 5),

i) *reguligo de la elekto kaj revoko de la parlamentaj deputitoj* (Art. 66).

La ĵus denombritajn eksplicitajn rajtojn la parlamento laŭorde plenumas per leĝdono. La ceteraj eksplicitaj rajtoj estas la jenaj:

1. *Elekto de la Prezida Konsilantaro de Popolrespubliko*, Art. 10 alin. 3 punkto d) de la Konstitucio. (Art. 7 alin. 2 de la parlamenta agadregulo eldiras, ke okaze de kia ajn vakantiĝo ĉe la Prezida Konsilantaro de Popolrespubliko, la vakan lokon la parlamento devas plenigi dum sia plej proksima sesio),

2. *elekto de la Ministrokonsilantaro* (Art. 10 alin. 3 punkto e) kaj Art. 23 alin. 2),

3. *decido pri la militproklamo kaj packontrakto* (Art. 10 alin. 3 punkto g),

4. *elekto de la funkciuloj de parlamento* (Art. 12 alin. 3),

5. *elsendo de la komisionoj* (Art. 17 alin.),

6. *disigo de la parlamento antaŭ ĉeso de ĝia mandato, respektive plilongigo de ĝia mandato* (Art. 18 alin. 1—3),

7. *revoko de la Prezida Konsilantaro, aŭ ties kiu ajn membro* (Art. 21 alin. 3),

8. *elekto de la prezidanto kaj juĝistoj de la Plej Supera Juĝistaro — Kortumo* — (Art. 39 alin. 3),

9. *elekto de la plej supera prokuroro* (Art. 43 alin. 1).

La parlamento krom siaj eksplicitaj rajtoj rajtas rezervi por si mem en leĝo ankaŭ aliajn rajtojn. Konforme al tio la punkto II/1 de la parlamenta rezolucio N-ro 1 de 1956 eldiris: „*Ĉiujn bazajn problemojn, tuŝantajn la tuton de la laboranta popolo, oni devas en leĝo normigi.*”

(Daŭrigota)

Pri kelkaj pli gravaj praktikaj problemoj koncerne la kriminalan respondecon de la kuracisto

En nia socialismon konstruanta socia ordo la sanitara provizado de la laboruloj estas la tasko de la ŝtato. La laboruloj havas rajton je tia senpaga sanitara provizado, kiu estas altnivela, konvenas al la ĉjama stato de la medicina scienco, kaj kiu aplikas la plej novajn, plej sukcesajn kuracmetodojn kaj la plej modernajn kuracinstrumentojn.

En nia epoko la scienco ŝturme evoluas. Ankaŭ la medicinisto devas fari paŝojn paralele kun tiu ĉi evoluo. Estas lia devo en intereso de la prevento kaj sukcesa kuracado de malsanoj koni kaj apliki la pli novajn kaj pli perfektajn kuracmetodojn. La uzado de la modernaj kuracinstrumentoj postulas de li kvazaŭ inĝenierajn konojn.

Ju pli komplika estas lia laboro, des pli granda estas lia honoro, kaj grava lia rolo en nia socio, sed samtempe des pli granda estas ankaŭ lia respondeco.

La rajtoj ligitaj al la personeco de la homo kaj la kuracado

En nia konstitucio estas la plej brile fortikigitaj rajtoj: *la persona libereco kaj la neofendebleco de la civitanoj.*¹ Ĉi tiuj rajtoj estas absolutaj, ili defendas ĉiujn kontraŭ ĉiuj. Tiujn rajtojn oni ne povas abdiki. *Neniu estas senhavigebla de siaj personaj rajtoj, maksimume la ekzercado de ĉi tiuj rajtoj estas limigebla inter konstitucie fiksatajn barojn.*

Kiam la medicinisto kuracas, kaj preventan aktivecon daŭrigas, li trudiĝas en la vivon de la homo, kaj havas senperan influon en la homan organismon. Tial la medicina influo ŝajne ofendas la nevundeblecon kaj en certa senco ankaŭ la personan liberecon de la homo.

Sed *la defendo de la sano estas grava ŝtata tasko.* La sama konstitucia devo, kiel la neofendebleco de la homaj rajtoj.²

Kiam por intereso de la socio en la batalo kontraŭ la malsanoj la medicinisto devas ofendi okaze de epidem-aferaj taskoj la personan liberecon, nevundeblecon, samtempe li servas ankaŭ la individuan intereson de ĉiuj ŝtatanoj. Tiel la sanprotekto signifas ankaŭ plenan disvastigon de la rajtoj de la persono. Tamen la celo de la sanprotekto ne povas esti definitiva ĉesigo de la personecaj rajtoj, nek malhelpo de vivfunkcio de la homa organismo.

La sanitara aranĝoj plenumitaj por la intereso de la kolektivo aŭ individuo, inter neniamaj cirkonstancoj licas celi la vivestingon de kiu ajn persono, nek pri-mare la limigon de vivprocezoj de la individuo, la dis-igon de la unueco de lia organismo. La aranĝojn plenumitajn por tia celo oni ne povas konsideri kiel san-

protektajn aranĝojn, ili ne povas signifi veran kuracistan agadon."³

La homo ne vivas izoligite, ne estas sola, sed li estas ano de la socio. Per la akcento de siaj individuaj interesoj neniu rajtas agi libere kontraŭ la intereso de la socio. Mem la kuracado el la vidpunkto de la individuaj interesoj ne signifas la ofendon de la rajtoj ligitaj al la persono, eĉ se tio okazas kun perfortema interveno (ekz. operacio).

„La kuracado ebligas ... la postvivon, aŭ la pli plenan evoluon de la persono. Tial la kuracado inter neniamaj cirkonstancoj, eĉ se mankas eksplicita konsento de la paciento, ne povas kaŭzi ofendon de la personecaj rajtoj."⁴

La individuan personan rajton oni devas senkondiĉe limigi por la intereso de la kolektivo. Oni devas kondamni tiun, kiu memamputas sin por fariĝi invalido, ke tiamaniere li povu eltiri sin el sub sociaj, ŝtataj devoj (ekz. aktiva militservo), aliparte li povu pretendi la patronadon de la socio.

Estas nepermeseble, ke iu sub preteksto de sia persona netuŝebleco rifuzas la medicinistan provizadon kaj per sia malsano, per neglekto de sia kuracado endanĝerigas aliajn homojn. Ekzemple la neglekto de la infektaj malsanoj, inter ili la veneraj malsanoj, aŭ la tuberkulozo grave endanĝerigas, eĉ super certaj limoj ofendas la interesojn de la tuta socio. Tial en ĉi tiuj kazoj eĉ malgraŭ volo de la paciento devas validiĝi la kuracada, preventa aktiveco de la medicinisto.

La devoj de la medicinisto en urĝa neceso kaj okaze de tuja helpo.

La *Medicinista Regularo* ne difinas la nocion de urĝa neceso, ĝi mencias nur tion, ke *urĝa neceso estiĝas en kazo de mortdanĝero kaj ĉe tuja helpbezono.*⁵

La *ministra ordono* pri la plenumigo de la *Medicinista Regularo* jam precize ĉirkaŭskribas la nocion de la urĝa neceso.

Urĝa neceso estiĝas unuavice, se la forresto de la tuja kuracista provizado antaŭvideble danĝerigas la vivon, respektive la korpan integrecon de la paciento. Sed oni devas konstati urĝan neceson ankaŭ tiam, kiam la forresto de la kuracista provizado povas kaŭzi en la sana stato, respektive en la korpa integreco de la paciento daŭran aŭ neripareblan damaĝon. Okaze de urĝa neceso la medicinisto sendepende de tempo de la anoniĝo devas esti je dispono nokte kaj tage al kiu ajn malsanulo. Se li estas vokata, li ne rajtas rifuzi la inviton. La medicinisto liberigas el sub ĉi tiu devigiteco nur se li estas malhelpata, ekz. la kuracisto estas mem malsana, aŭ pro neĝblovado la vojo estas neirebla, aŭ se li komisiis alian mediciniston. Eĉ manko de la specialaj

fakaj konoj ne liberigas la kuraciston, dum urĝa neceso aĝi konvene al lia instruiteco kaj laŭ la konkretaj ebloj.

Pri *unua helpdono* estas parolo, se iu sekve de akcidento aŭ de kia ajn alia kaŭzo tujan kuracistan helpon bezonas.⁶ Se la bezonon la medicinisto proprapersono konstatas, aŭ lin oni vokas, li estas devigata konvene al lia instruiteco kaj konkretaj ebloj senprokraste fari la unuan kuracistan provizadon. Li estas liberigata nur en ne forigeblaj kazoj, simile kiel ĉe la urĝa neceso.

En kazo de operacio la stato de la homa organismo, ties konvena funkciado povas iĝi ne certa. Eventuale pro savo de la tuto oni devas oferi iun parton de la homa organismo. Ofte okazas, ke la medicinisto devas tiamaniere miksiĝi en la funkciadon de la homa organismo, kaj ties sukceso estas anticipe malcerta.

En ĉi tiuj kazoj la apliko aŭ forlaso de la enkorpora interveno vere estas koneksa kun la personeco de la malsanulo. De tio dependas la postresto aŭ eventuale la pereco de la persono. Tiam la decido, ĉu oni operaciu lin aŭ ne, estas rajto de la malsanulo, kiun li manifestas proprapersono aŭ per sia familiano. La operacio por la medicinisto estas permesata nur kun la konsento de la malsanulo. Se la malsanulo por sia stato ne estas kapabla doni skriban konsenton aŭ li estas neplenaĝa, al la operacio oni bezonas skriban konsenton de la familiano de malsanulo.

Se mortdanĝero estas konstatita, por ties ĉesigo oni rajtas fari operacion eĉ sen konsento de la malsanulo aŭ de lia familiano. Simile okazas, se dum la operacio aperas mortdanĝero. Ĉe certa mortdanĝero la medicinisto devas fari eĉ kontraŭ volo de la malsanulo la plej konvenajn aranĝojn. Ekz.: se iu el memmortiga intenco tranĉas siajn vejnojn, ne dependas de la volo de la memmortigonto ĉu liaj vejnoj estu insertitaj aŭ li estu transportata en hospitalon!

En mortdanĝero la mediciniston devigas unuavice etikaj reguloj fari senkondiĉe kuracistan provizadon. Sed krom tio ankaŭ kriminaljuraĵ reguloj preskribas tiun sian devon. La devo pri unua helpodono ŝarĝas ne nur la kuraciston, sed ĝenerale ĉiun homon. Tamen kiu pro karaktero de sia profesio estas devigata al la tuja helpodono, ties respondeco estas pli granda ol tiu de la laika homo. Nome: *kiu malgraŭ sia profesio ne donas la de li atendeblan helpon al persono, kiu estas korpe difektita, suferis akcidenton, aŭ falis en situacion, kie lia vivo aŭ lia sano estas rekte endanĝeriginta, estas punota je mallibero daŭrebla ĝis tri jaroj. La puno daŭras de 6 monatoj ĝis 5 jaroj, se la difektilo mortis, kvankam sian vivon la tuja helpo estus povinta savi.*⁷

La devo de diskreteco kaj la krimiljuraĵ konsekvencoj de ĝia malobservo

Al la medicinisto ne estas permesate sciigi aliulojn pri faktoj kaj indikoj, kiuj koncernas la higienan staton de la paciento, kaj kiujn la kuracisto dum la plenumo de sia profesio eksciis, kaj kies malkaŝo povas kaŭzi al kiu ajn damaĝojn aŭ malavantaĝon.

Ĉi tiu ordono ne koncernas la kazon, se la mediciniston jura normo devigas sciigi la indikojn, aŭ se je tio la interesata persono lin rajtigis.⁸

Objektive la faktoj tireblaj en la rondon de la me-

dicinista diskreteco estas divideblaj je du kategorioj. Unue ekzistas faktoj, kiuj strikte koncernas la higienan staton de la paciento. Aliparte ne estas evitebla, ke dum la kuracado eksciĝu la medicinisto indikojn, kiuj ne koncernas ekskuzive la staton de la malsanulo. Tamen ĉe tiuj lastaj la specifa konfida karaktero de la medicinista funkciado motivas konservi la diskretecon.

El *subjektiva vidpunkto* la intereso kaj la volo de la defendenda persono determinas la rondon de la faktoj apartenantaj al la medicinista sekreto. La malkaŝo de tiaj indikoj estas nur tiam malpermesata, se el tio povas okazi al kiu ajn damaĝo aŭ malavantaĝo. Kompreneble la interesato povas doni absolvon.

La devo de diskreteco havas *jurregulajn limojn. Komuninteresajn barojn enkondukas la ĵura regulo unuavice por la scienco, publiksanitaraj aferoj, krimpersekutado kaj ĝenerale pro la ŝtata administrado kaj justodono.*

La evoluo de la medicinista scienco estas komuna intereso, sed ankaŭ la sciencan celon servanta komunikado povas koncerni severe nur la staton, malsanon de la paciento aŭ la akiritajn spertojn. Ne licas publikigi la nomon de la malsanulo, aŭ igi lin ekkonebla.

Por la intereso de la *sanitaro* la mediciniston ŝarĝas anonca devo, se la higiena stato de la kuracita persono endanĝerigas la sanon de la aliaj. Ankaŭ je peto de la sanitara estraro la medicinisto devas komuniki la petitajn indikojn.

Por la intereso de *justodono* la rezulton de la kuracista ekzameno — plenumita el magistrata komisio — la medicinisto devas anonci al la deleganta magistrato. Por certigi la konvenan kuracadon de la paciento la pli frue aganta medicinisto devas sciigi la indikojn al la eventuale poste kuracanta alia medicinisto.

Ĝenerale la medicinisto la faktojn, kiuj koncernas la higienan staton de la paciento rajtas sciigi nur al la familiano de la paciento.

Ne estas permesate al la kuracisto sciigi al la familiano de plenaĝa paciento tiajn indikojn, pri kiuj la paciento precipe petis lian diskreton, escepte se la malkaŝon motivas la resaniĝo de la malsanulo.⁹

En la kriminala proceduro la devo de atesto estas ĝenerala normo, el sub kiu la leĝo povas permesi escepton. Por certigi la medicinistan diskreton la edikto tiel disponas, ke dum la kriminala proceduro la medicinisto rajtas rifuzi la ateston, se per sia atesto li malobservus sian devon de diskreto, escepte, se la interesato liberig's lin de tiu devo.¹⁰

La enhavo de la medicinistaj notoj, kartotekoj, simptom-priskriboj, operaciaj taglibroj kaj aliaj medicinistaj skribaĵoj formas medicinistan sekreton. Tiel la devo de diskreteco baras la vojon ankaŭ al la perdokumenta pruvo. Kompreneble, kiam la leĝo ne liberigas el sub la atesto-devo, tiam la devo de diskreteco eklipsas.¹¹

La limigon de la medicinista diskreteco signifas ankaŭ la ordono de nia kriminala proceduro koncerne la denunco-devigon. Se la medicinisto estas membro de estraro, kaj en sia agosfero funkciante li eksciis indikojn de krimo, lin ŝarĝas denunco-devo. Ĉi devenas el lia medicinista karaktero, sed ŝarĝas lin kiel membron de la estraro.

Laŭ la ordonoj de nia kriminala proceduro la denunco de la eksciita krimo estas rajto kaj devo de ĉiuj ŝtatanoj. Ĉi tiun ĝenerale validiĝantan devon limigas rilate al la medicinisto la devo de diskreteco, kiel escepta jura normo. Ĉi tio signifas, ke la medicinisto kiel tia ne devas la krimon denunci: li estas en escepta situacio, se li eksciis la indikojn aludantajn al krimo konekse kun la kuracado de sia paciento.

Tamen ekzistas ankaŭ esceptaj kazoj, kiam la denunco de la krimoj fariĝas jura devo laŭleĝe preskribita. En tia kazo la medicinisto ne povas sukcese aludi al sia devo de la diskreteco, se li neglektas la kriminalan denuncon. Tiam li kulpas krimon same, kiel kiu ajn.

NOTOJ:

- ¹ „La Hungara Popolrespubliko garantias la personan liberecon kaj neofendiblecon de la civitanoj...” Konstitucio § 57 (Leĝo XX, el 1949).
- ² „La Hungara Respubliko defendas la sanon de la laboruloj...” Konstitucio § 47, alineo (1).
- ³ Károly Törő: La medicina civiljura rilato, Budapest, 1965., paĝo 10.
- ⁴ Citita verko, paĝo 11.
- ⁵ „En kazoj de la urĝa neceso (mortdanĝero, unua helpo)

Do, se la medicinisto kredon meritante ekscias pri intencata kulpo de komploto, ribelo, frakasado ktp.

La leĝo do ne devigas la mediciniston pri senkondiĉa devo de diskreteco, sed sufiĉe vaste determinas ankaŭ la rondon de la esceptoj.

Kiu sen motivebla kaŭzo malkaŝas privatan sekreton ekkonitan pere de sia profesio, estas punenda je eduka laboro daŭreble dum ses monatoj aŭ je monpuno.¹²

Surbaze de tiuj leĝaj ordonoj la medicinisto nur tiam estas prirespondebla, se ne ekzistas esceptoj, kiuj malpliigas la devon de la kuracista diskreteco. Sed ankaŭ tiukaze komenciĝas kriminaljura proceduro nur post la privata iniciato de la ofendito.

la kuracisto devas ankaŭ ekster sia preskriba tempo kaj loko doni al la paciento la necesan kuracistan provizadon.” Medicina Regularo, § 7, alineo (3).

- ⁶ 3/1959. Min. Dekr. § 19, alineo (1).
- ⁷ Kriminaljura Kodo, § 259, alineoj (1-3).
- ⁸ 1959-jara 8-a edikto, § 10, alineo (1).
- ⁹ Dekr. 3/1959. de San. Min. § 22, alineo (1).
- ¹⁰ Kodo de Kriminala Proceduro, § 65.
- ¹¹ Citita Dekr. § 84.
- ¹² Kriminaljura Kodo, § 264.

Bibliografio...

- Esperanto*. La lingua auxiliaria internazionale. Jaro III, N-ro 3, Jaro IV, N-ro 1-2.
- l'esperanto*. Oficiala Organo de la Itala Esperantista Federacio, N-ro 133., 134., 135.
- Prospekto pri *Ferfabrikoj de Klement Gottwald en Vitkovice* (Ĉeĥoslovakio). Ekzemplerojn, demandojn kaj mendojn postulu je adreso: Dum kultury VZKG Esperanto, Ostrava 1.
- Hungara Fervojista Mondo*, kvaronjara revuo de la Fervojista Esperanto-Movado en Hungarujo. Jaro XIII, N-ro 1.
- The British Esperantist*, oficiala organo de la Brita Esperanto-Asocio, N-ro 751., 752., 753.
- Dana Esperanto-Bulteno*, eldonata de Centra Dana Esperantista Ligo, Jaro 41. N-ro 2.
- der esperantist*, oficiala organo de Esperanto-Amikoj de GDR en la Germana Kultur-Ligo, Jaro 5, N-ro 27., 28., 29.
- Bulgara Esperantisto*, organo de Bulgara Esperantista Asocio, Jaro XXXVIII. N-ro 1., 2., 3-4.
- Esperanto-Gazeto*, organo de Internacia Instituto Por Oficialigo De Esperanto, Jaro IV. N-ro 1., 2., 3., 4.
- New Zealand Esperantist*, oficiala bulteno de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, N-ro 324.
- Nuntempa Bulgario*, eldonaĵo de Agentejo Sofia-Press, N-ro 1/1969, N-ro 2/1969, N-ro 4/1969.
- Heroldo de Esperanto*, duonmonata internacia organo de la Esperanto-Movado, N-ro 1464., 1465., 1466-67., 1468., 1469., 1470.
- La Socialisto*, organo de Aŭstria Socialista Ligo Esperantista, Jaro VI. N-ro 1., 2.
- Eldonaĵo „*Invito al Ĉeĥoslovakio*” de Kleriga Instituto en Prago (Blanička 4, Praha-Vinohrady). Kun multaj fotoj, ampleksa informo diversa: geografia, kultura, gastronomia, turisma, kulturaj festivaloj, listo de Esperanto-rondetoj ktp. Ege bona lingvostilo.
- Bulgarino*, eldonaĵo de la Komitato de l' Bulgaraj Virinoj (bulv. „Patriarh Evtimi” 82, Sofia), N-ro 9/1967.
- Franca Esperantisto*, oficiala organo de Unuiĝo Franca por Esperanto, N-ro 256., 257.
- Grupa Vivo*. Informa Kajero por Esperanto-Societoj. Jaro IV. N-ro 1 (21).
- Agad-Programo de Komunista Partio en Ĉeĥoslovakio*, akceptita en Plenkunsido de la CK de KPC la 5-an de aprilo 1968. Eldonita de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato pere Kleriga Instituto en Praha.
- Dokumentoj Nacia Fronto de Liberigo de Sud-Vjetnamio*, eldonita pere de GIAI PHONG-Eldonejo, Hanoi.
- Fervoja Terminareto*. Esperanta—Hungara; Hungara—Esperanta. Eldonis: Fervojista Fakto de Hungara Esperanto-Asocio. Redaktis: D-ro István Bácskai. 1000 ekzempleroj en fotopresita formo; 144 paĝoj. Korekta Esperanto-faklingvo.

Fervojistaj sindikatoj en Socialisma Respubliko Rumanujo

La Art. 51 el la Statuto de Sindikatoj de Socialisma Respubliko Rumanujo mencias, ke „*la Sindikatoj de la entreprenojoj, ŝtataj agrokulturaĵoj, deponejoj por traktoroj kaj agrokulturaĵoj, Sindikataj Unioj, Centra Komitato de la Sindikatoj havas juran personecon...*” El tio oni povas konkludi, ke en nia lando la laboristoj kaj ĝenerale la salajruloj ŝtataj aŭ privataj en ĉiuj entreprenoj povas organiziĝi en profesiaj sindikatoj.

La entreprena sindikatoj estas la fundamento de la sindikata movado en nia lando.

Por ke ĉiuj problemoj, kiuj koncernas la rajtojn de membroj de la sindikatoj kaj la rilatojn de tiuj membroj al la entreprena estraro estu solvitaj en la plej taŭgaj manieroj, kaj por ebligi al la sindikata estraro kunpreni ĉiujn detalojn de la laboristaj aferoj, la sindikatoj povas esti dividataj en subunuoj, tiel nomataj sindikataj organizoj de sekcioj, fakultatoj direktoj ktp., kies rolo estas zorgi pri la lokaj problemoj, kiuj naskiĝas en vicoj de la salajruloj kaj kiuj problemoj bezonas urĝan solvon.

Ĉar ĝenerala tasko de la sindikatoj estas defendi la interesojn de la membroj antaŭ juĝistaj kaj aliaj ŝtataj instancoj, kaj por ebligi la plej efikan kaj urĝan intervenon de la respondecaj sindikataj instancoj en kazoj, kiam naskiĝas diferencoj inter laboristoj kaj entreprenoj, la strukturo de la sindikata organizo estas bazita sur la bone konatan sistemon: *Demokratia Sistemo*.

Ĝia rolo estas duobla: fari ebla la konon de la problemoj: kaj ke la interveno de la sindikataj instancoj efiku baldaŭ, kiam la problemoj naskiĝas.

Kiel oni povas atingi tiujn celojn?

La respondo estas simpla: ĉar de malsupre ĝis la plej supera ŝtupo de la fervoja organizo — Ministerio — funkcias sindikataj komitatoj, kiuj havas eblon koni la situacion plej detale en ĉiu momento. Tiu ĉi karaktero de la organizado estas ĝenerala ĉe ĉiuj sindikatoj.

La fervojaj sindikatoj apartenas al Unio de Fervojaj Sindikatoj, kiu gvidas kaj zorgas pri la korekta aplikado de la leĝoj kaj direktivoj de la ŝtataj instancoj, sed samtempe ankaŭ pri la respekto, kiun la salajruloj ŝuldas al la leĝoj, regularo aŭ aliaj laŭleĝaj disponoj.

En nia lando la sindikatoj partoprenas en la diskutoj, pri ellaborado de la leĝoj kaj direktivoj, kiuj tuŝas la interesojn de la membroj de sindikatoj kaj ĝenerale tiujn de la popolo. La solvo de eventuala problemo, kiu naskiĝas ĉe la aplikado de la leĝoj aŭ direktivoj estas faciligita per tio, ke antaŭ la prezentado de kiu ajn leĝo al *La Granda Nacia Kunveno* — Marea Adunare Nationala — ĝi estas submetita al diskutado en ĉiuj entreprenojoj, kooperativoj, agrokulturaĵoj, do, la homoj havas ne nur rajton, sed ankaŭ la eblon modifi la projekton, fari proponojn por la plibonigo de la leĝoj, eĉ rifuzi ilin.

Tiuj asertoj ne estas nur malplenaj vortoj. Bon-

volu partopreni en tiaj kunvenoj, vidi kaj aŭdi kiel la pleje simplaj homoj kontraŭdiras, kritikas aŭ aprobas la leĝoprojektojn, kiuj post la voĉdono de la Granda Nacia Kunveno postulas devige la respekton fare de ĉiuj.

Por pli bone kompreni la rolon de la sindikatoj en nia lando, mi ekstraktas el la statuto:

Art. 26: „*La Centra Komitato de la Unio garantias la plenumon de la decidoj de Centra Konsilantaro de la sindikatoj, koncernaj la specifajn problemojn de la laboro de la fakaj sindikatoj. Kunlaborante kun la Ministerioj kaj centraj ŝtataj instancoj partoprenas en la ellaborado de la specifaj problemoj de la respektiva branĉo kaj en la ellaborado de jaraĵoj kaj perspektivaj planoj, kiuj temas pri la disvolvigo de la branĉoj;*

en la ellaborado de la mezuroj, kiuj koncernas la plibonigon de la laboro kaj tiun de la sistemo de la salajrigado;

en la ellaborado kaj realigado de la plano pri kvalifiko, disdivido kaj promocio de la necesaj kadroj de la respektiva laborbranĉo;

ĉe la aranĝo de la laborotempo, ripozo kaj libertempo, sekureco de la laboristoj dum deĵorado, de divido de speciala ŝirmitaĵo.”

El la menciitaj ekstraktoj videbliĝas, ke la sindikatoj de la fervojistoj pere de iliaj reprezentantoj partoprenas efektive en ĉiuj debatoj aŭ kunvenoj, kaj tiamaniere havas eblon evitigi la neleĝajn disponojn, kiuj ĝenus la dungitojn. Ili povas informiĝi pri la problemoj, kiuj ilin interesas; povas eviti, ke iuj estroj de entreprenoj el diversaj kaŭzoj erare apliku la menciitajn normojn.

Eble oni opinius, ke en tiu organizado la homoj neniam havus motivon plendi kontraŭ estraroj de entreprenoj. Sed tio estas erara, ĉar homoj estas homoj kaj ĉiam submetitaj al la homa naturo. En la vivo estas momentoj, kiam la homo vole-nevole montras mal- aŭ miskomprenon por diversaj aferoj. Tial oni zorgis pri la kreado de diversaj instancoj, al kiuj oni rajtas sin turni petante pri juĝado en la konfliktoj.

La unua instanco, kiu funkcias en ĉiu entrepreno aŭ oficejo, kie ekzistas Sindikata Komitato, estas „*Komisiono por solvi laboraferajn konfliktojn*”. Ĝi devas solvi la aferon en la plej mallonga tempo, sed la partio ne kontenta pri la decido, povas sin turni al la Sindikata Komitato, kiu rajtas ŝanĝi la decidon aŭ lasi ĝin valida.

En ambaŭ kazoj la partioj rajtas apelacii al la Tribunalalo, kies decido estas definitiva. Tamen el vidpunkto de leĝeco oni povas sin turni ankaŭ al la plej alta Jura Instanco por peti revizion: la decido de la Plej Supera Tribunalalo de la Respubliko estas la lasta.

Estas notinde, ke la laboraferaj konfliktoj ĝuas la plej simplan proceduron kaj estas solvitaj urĝe kaj senpage. Estas ankaŭ notinde, ke la decido de la Sindikato ludas gravan rolon en la solvo de la konfliktoj.

Kelkaj demandoj de la krimfarado de la junaĝuloj en Soveta Unio

Generale estas konata fakto, ke en Soveta Unio konstante malaltiĝas la krimfarado de la neplenaĝuloj. Ekzemple: en la jaro 1960 estis kondamnitaj neplenaĝuloj kvarfoje malpli, kaj la meza nombro de neplenaĝaj kondamnitaj kompare al la tuto de la kondamnitaj dum la lastaj jaroj estas 3—4 procentoj.¹ Konstante kaj grave malaltiĝas la nombro de la pli dangeŝaj krimoj. Nuntempe en Soveta Unio tute ne estas profesia la krimfarado, preskaŭ tute estas forigita la banditismo, ktp. Dum la lastaj 20 jaroj je pli ol la duoblo reduktiĝis la krimfarado.²

Tamen la krimfarado de la junularo estas ankoraŭ tre sentebla. Cetere, ne estas tre riska, se mi notas, ke la problemo de la junulara krimfarado estas nuntempe tutmonda problemo. Tio estas komprenebla: neniu prudentan homon povas lasi en trakvilo la fakto, ke rimarkebla parto de la juna homaro hodiaŭ ne estas preta preni morgaŭ en siajn manojn la regadon pri nia socia vivo.

La kaŭzoj de la junularkrimfarado estas multnombraj kaj eĉ simple denombri ilin, estas neplenumebla deziro. Tamen ni povas distingi kelkajn plej elstarajn. Por distingi ilin necesas komence respondi al la demando: kiu inter la neplenaĝuloj pli ofte faras krimojn?

Se ni provos dividi la junaĝajn krimulojn laŭ la ekonomia aŭ kultura bonstato de ilia familio, ĉu laŭ la gepatra klereco, ĉu laŭ la pli frua puniteco, ĉu laŭ sporta entuziasmo, kaj tiel plu, ni ne trovos tre gravajn diferencojn inter reprezentantoj de tiuj grupoj. Certe, familia malbonstato, malalta gepatra klereco, antaŭa puniteco de la junulo ĉio ĉi iel influas ĉe formiĝo de neplenaĝula karaktero. Kaj ne nepre tiuj ĉi kaŭzoj elvokas malutilajn sekvojn. Ekzemple: tre ofte el familio, kie patro senmezure trinkas alkoholaĵon, formiĝas kontraŭalkoholisma persono, ĉar ĉe infano jam en junaĝo, kiam li observas ebrian vizaĝon de sia patro, naskiĝas malamo kontraŭ alkoholismo (nature, se la infanon influas ankaŭ aliaj, pozitivaj faktoroj). La vivo donas ankaŭ aliajn kazojn. Ekzemple: ekonomia bonstato de familio povas eduki junan avidulon, fiaferiston.

Nur tri procentoj de neplenaĝaj krimuloj respondis, ke ili faris krimon pro ekonomia manko.³ Famalia enspezo de neplenaĝa krimulo plej ofte egalas tiun de familio de nepekanta junulo.⁴

Finfine la krimfarado estos forigota. Ni, sovetanoj, ne estas tiom senespere pessimistaj en lukto kontraŭ la krimoj, ke ni certigu, ke „la krimfarado estas necesa”, ke „socio sen krimoj ne povas ekzisti”.⁵ Laŭ nia opinio „cirkonstancoj same kreas homojn, kiel homoj kreas cirkonstancojn.”⁶ Tio signifas, ke nur de ni dependas la plibonigo de nia stato en diversaj aferoj.

Ĝis la 60-aj jaroj de nuna jarcento ĉirkaŭ 70% de la neplenaĝaj krimuloj estis tiaj gejunuloj, kiuj rezulte

de la II-a mondmilito restis sen patro (aŭ gepatroj). Nun la situacio ŝanĝiĝis: granda plimulto de junaj krimuloj havas ambaŭ gepatrojn.⁷

Kiel ni menciis, neplenaĝaj krimuloj povas esti dividitaj teorie laŭ diversaj grupoj. Tamen mi precipe ellevus tri grupojn:

1. *Junularo laboranta en produktoj;*
2. *Junularo, kiu havas malaltan klerecon kaj nenie laboras;*
3. *Drinkemaj neplenaĝuloj.*

I. *Junularo laboranta (aŭ laborinta) en produktoj*

Tiu grupo koncerne la junajn krimulojn estas la plej grandnombra. Malgraŭ tio, ke kompare al la tuta laboristaro de USSR, la neplenaĝuloj estas malmultnombraj, en la tuto de la juna krimularo ili estas grandnombraj (50—55%).⁸ Kio klarigas tion?

Iuj juristoj-espioristoj opinias, ke la laborantaj gejunuloj havas monon. (Sovetaj junaj laboristoj havas relative altan salajron, 60—70 rublojn de komenco de laborado. Tiu salajro egalas al salajro ricevita en profesioj, en kiuj laboras nur plenaĝaj homoj, gardistoj, purigistoj). Tamen laŭ nia opinio tio ne estas ĉefa. La praktiko montras, ke ĝenerale ju pli altan salajron havas junulo, des pli malofte li ekiras kriman vojon. Necesas substreki, ke pli ofte faras krimojn gejunuloj, kiuj havas plej malaltan salajron, ĉirkaŭ 60—70 rublojn. Ili estas junuloj, kiuj nur nun komencis laboradi kaj plej ofte ankoraŭ ne estas memstaraj laboristoj, sed nur lernantoj en produkta lernejo. Ilia laboro estas tre facila kaj mallongtempa. La 15-jaraĝa junularo laboras ne pli longe, ol dum 5 horojn: junularo de 16 ĝis 18 aĝoj 7 horojn en la tago. La laborsemajno por la neplenaĝuloj estas sama, kiel por plenaĝaj homoj, 5-taga.

Kvankam ĉiuj laborantaj gejunuloj havas neplenan labortagon (ne 8-horan), tamen ili ricevas ok-horan salajron, ĉar la ŝtato kompletigas al ili la salajron. Ekzemple: laboranto-tornisto havas 50-kopekan horan tarifon. Plenaĝulo dum 8 horoj prilaboros $0,5 \times 8 = 4,0$ rublojn. La 15-jarulo laboras ne dum 8, sed dum 5 horoj, sed salajron ricevos $5,0 \times 5 + 5,0 \times 3 = 4,0$ rublojn (same, kiel plenaĝulo).

La juĝista praktiko montras, ke la plimulto de la junaj krimuloj devenas el la laboranta (aŭ laborinta) junularo. Ili havas facilan laboron, multe da libera tempo kaj relative altan salajron.

II. *Junularo, kiu havas malaltan klerecon kaj nenie laboras*

Karakteriza trajto ĉe granda plimulto de junaj krimuloj estas la malalta nivelo de ilia klereco kaj ĝenerala kulturo. Kvankam en Soveta Unio nun estas en-

kondukata deviga 10—11-jara lernado, granda parto de la juna krimularo ne havas eĉ 8-klasan klarecon (pli ol 50%). Tio montras, ke plejparto el ili nenie lernas. Estas evidente, ke ne la krimemo estas kaŭzo de la mal-inteligenteco, sed inverse la malalta intelekta nivelo. Do, ju pli rapide oni sukcesos allogi ĉiujn gejunulojn al plua lernado, des pli rapide estos malaperigota unu el plej ĉefaj kondiĉoj de junulara krimfarado. Juristaj kaj sociologiaj esploroj en Soveta Unio atestas pri tio, ke tre malofte faras krimojn kleraj homoj. Kaj ankoraŭ pli interesa fakto estas: eĉ se laborantaj junuloj havas malaltan klarecnivelon, sed lernas en vespera lernejo, ili preskaŭ neniam faras krimojn.

La verŝajna kaŭzo de tio estas: okupiteco de la gejunuloj per utila afero. Plej ofte la gejunuloj ne povas tute kompreni, ke la klareco malfermas iliajn okulojn al la vivo. Necesas do interesigi ilin per ĉiuj eblaj rimedoj pri la lernado.

En Soveta Unio tiuj rimedoj ekzistas. La gejunuloj havas mallongigitan labortagon. Kiu deziras lerni (en lernejo ĝenerala aŭ supera, en universitato) kaj samtempe labori en produktoj, ricevas de la ŝtato pagatan permeson por ekzameniĝo. Ĉiu juna, ankoraŭ ne laboranta lernanto rajtas en unua vico kaj laŭ lia deziro (por iu konkreta profesio) esti akceptita en produktojn.

Hodiaŭ la soveta ŝtato, registaro kaj komunisma

partio faras tre multon en intereso de la lernado. Kaj tiu ĉi peno estas komprenebla, — klareco ne estas nur rimedo kontraŭ krimfarado, sed krome klera popolo estas la plej firma bazo por la hodiaŭa kaj morgaŭa konstruado de nia fina estonteco.

III. Drinkemaj neplenaĝuloj

Drinkemeco por ĉiu malinteligenta homo estas limo, post kiu komenciĝas krimoj. Havante nesufiĉan kapablon kontraŭagi al malutilaj influoj, junulo en ebria stato ofte fariĝas tute nekapabla kontraŭstarigi sian volon al la aperiganta krimdeziro. La soveta kriminala kodo ĝis antaŭnelonga tempo ne konsideris drinkstaton kiel plipezigilon de la kriminaljura respondeco. Tio en certa grado eĉ helpis al drinkuloj fari krimojn, ĉar ne ĉiu sobra homo kuraĝas krimagi, sed por ebria homo, kiel diras rusa proverbo: „eĉ maro estas ĝisgenua”.

Nun la krimagon faritan en ebria stato la juĝistaro punas pli severe, ol la sobrajn krimulojn. Esploroj montras, ke ĉirkaŭ 85% de neplenaĝuloj antaŭ siaj krimagoj jam uzis (ofte aŭ malofte) alkoholaĵon.⁹

Kontraŭ alkoholismo luktas la tuta mondo. Por tiu celo fondiĝis ankaŭ la Esperantista Tutmonda Kontraŭalkohola Asocio en 1963. Estus dezirinde, ke ĝi pliampleksigu sian sferon kaj agu inter ĉiuj loĝantoj de la mondo.

LITERATURO:

¹ V. S. Orlov: „Neplenaĝulo kaj krimo”, Moskva, 1969; p. 14.

² Lernolibro „Kriminologio”, Moskva, 1968; p. 116.

³ Lernolibro „Kriminologio”, Moskva, 1966; p. 72.

⁴ „Soveta Justico”, N-ro 3, p. 16; jaro 1966.

⁵ Emil Djurkgejm: „Sociologio de Krimeco”, Moskva, 1966; p. 42-44.

⁶ Karl Marx-Fridrich Engels: „Verkaro”, vol. 3, p. 37.

⁷ „Socialisma Leĝeco”, N-ro 12, p. 21; jaro 1968.

⁸ „Soveto Justico”, N-ro 2, p. 26; jaro 1968.

⁹ „Komsomola Vero”, 14-a de oktobro 1967.

⁹ „Socialisma Leĝeco”, N-ro 4, p. 56, N-ro 12, p. 20-21; jaro 1968.

G L O S A R O

<i>kantileno</i>	oreflata melodio
<i>klostro</i>	monak(in)ejo
<i>lasciva</i>	malĉastema
<i>lekto</i>	kuŝejo uzata de la romianoj dum manĝo
<i>lontana</i>	malproksima
<i>mava</i>	malbona
<i>minca</i>	maldika
<i>neŭrozo</i>	malsano de psiko
<i>noc</i>	malutili
<i>omeno</i>	malbona antaŭsigno
<i>orgoĵlo</i>	malhumila fierego
<i>pietato</i>	respekta sento pri mortintoj aŭ tradicioj
<i>pita</i>	malgrand(aĉ)a
<i>prestidigiti</i>	ŝajniĝi sorĉon lertfingre
<i>prizono</i>	malliberejo
<i>rekvizito</i>	necesa akcesoraĵo

<i>rojo</i>	eta rivereto
<i>siro</i>	estra, reganta moŝto, reĝa moŝto
<i>skabelo</i>	pedbenketo
<i>softa</i>	mallaŭta
<i>sombra</i>	malhela
<i>sordida</i>	malpurega (ankaŭ morale)
<i>superba</i>	grandioze bela
<i>stinki</i>	malbonodori
<i>ŝriki</i>	tranĉe voĉi kiel terurita virino
<i>tibio</i>	longa, rekta blovinstrumento
<i>titubi</i>	paŝi ŝanceliĝante de ebrio aŭ svenemo
<i>vaka</i>	malplena

MALLONGE...

N-ro 324 de *New Zealand Esperantist* en la Recenza Angulo donis detalan informon pri „*Internacia Jura Revuo*”.

UNUIĜINTAJ NACIOJ-KONFERENCO PRI LA JURO DE TRAKTATOJ

en Vieno (Aŭstrujo), Marto—Majo 1968

— Projekto de Artikoloj pri la Juro de Traktatoj —

II.

(Daŭrigo)

Parto III.

OBSERVADO, APLIKADO KAJ INTERPRETADO DE TRAKTATOJ

SEKCIO 1: OBSERVADO DE TRAKTATOJ

Artikolo 23.

Pacta sunt servanda

Ĉiu traktato efikanta ligas la partiojn kaj estas plenumenda de ili bonfide.

Artikolo 24.

Neretroaktiveco de la traktatoj

Krom se diferenca intenco montriĝas el la traktato aŭ estas alimaniere establita, ĝiaj preskriboj ne ligas partion rilate iun ajn agon aŭ fakton, kiu okazis, aŭ situacion, kiu ĉesis ekzisti antaŭ la dato kiam la traktato ekefikis koncerne tiun partion.

Artikolo 25.

Aplikado de la traktatoj al teritorio

Krom se diferenca intenco montriĝas el la traktato aŭ estas alimaniere establita, la aplikado de la traktato ampleksas la tutan teritorion de ĉiu partio.

Artikolo 26.

Aplikado de sinsekvaj traktatoj rilatantaj al la sama materialo

1. Kun rezervo pri la preskriboj de Artikolo 103. de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, la rajtoj kaj devoj de Ŝtato-partioj en sinsekvaj traktatoj rilatantaj al la sama materialo estu certigitaj laŭ la jenaj paragrafoj.

2. Kiam traktato preskribas, ke ĝi estas subigita al antaŭa aŭ posta traktado, aŭ ke ĝi ne estas konsiderenda kiel nekonforma al la antaŭa aŭ posta traktato, la reguloj de ĉi tiu traktato superas.

3. Kiam ĉiuj partioj en la antaŭa traktato estas ankaŭ partioj en la posta traktato, sed la antaŭa traktato ne estas ĉesigita aŭ ĝia funkciado provizore haltigita laŭ Artikolo 56, la antaŭa traktato aplikiĝas nur ĝis la mezuro, ke ĝiaj preskriboj estas konformaj al tiuj de la posta traktato.

4. Kiam la partioj en la posta traktato ne inkluzivas ĉiujn partiojn en la antaŭa:

a) Inter Ŝtatoj-partioj en ambaŭ traktatoj la regulo aplikenda estas la sama, kiel tiu de paragrafo 3;

b) Inter Ŝtato-partioj en ambaŭ traktatoj kaj Ŝtato-partio nur en la posta traktato, la posta traktato regas iliajn reciprokajn rajtojn kaj devojn.

5. Paragrafo 4 estas aplikenda sen antaŭefiko sur Artikolon 37, aŭ al iu demando pri la estingo aŭ provizora ĉeso de la funkciado de traktato menciita en Artikolo 57, aŭ al iu demando pri respondeco, kiu estiĝus por Ŝtato el la kontrakto aŭ aplikado de traktato, kies preskriboj estas nekonformaj al ĝiaj devoj al alia Ŝtato laŭ alia traktato.

SEKCIO 3: INTERPRETADO DE TRAKTATOJ

Artikolo 27.

Generala regulo de interpretado

1. Traktato estu interpretata bonfide laŭ la ordinara signifo donenda al la terminoj de la traktato en ilia kunteksto kaj en la lumo de la celo kaj intenco de la traktato.

2. La kunteksto por la celo de la interpretado de traktato konsistu, aldone al la teksto inkluzive ĝiajn antaŭkonsiderojn kaj aneksojn, el:

a) Ĉiu interkonsento, rilatanta al la traktato, farita inter ĉiuj partioj okaze de la kontrakto de la traktato;

b) Ĉiu instrumento farita de unu aŭ pluraj artikoloj okaze de la kontrakto de la traktato kaj akceptita de ĉiuj aliaj partioj kiel instrumento rilatanta al la traktato.

3. Estu konsiderata, kune kun la kunteksto:

a) Ĉiu posta interkonsento inter la partioj pri la interpretado de la traktato;

b) Ĉiu posta praktiko pri la aplikado de la traktato, kiu establas la interkonsenton de la partioj pri ĝia interpretado;

c) Ĉiuj trafikaj reguloj de internacia juro aplikeblaj en la rilatoj inter la partioj.

4. Speciala signifo estu donata al termino, se estas establite, ke la partioj tion intencis.

Artikolo 28.

Komplementaj rimedoj de interpretado

Oni povas sin turni al komplementaj rimedoj de interpretado, precipe al la prepara laboro de la traktato kaj la cirkonstancoj de ĝia faro, por konfirmi la signifon rezultantan el la aplikado de Artikolo 27, aŭ por determini la signifon, kiam la interpretado laŭ Artikolo 27:

a) Lasas la signifon ambigua aŭ obskura; aŭ

b) Kondukas al rezulto, kiu estas evidente absurda aŭ senracia.

Artikolo 29.

Interpretado de traktatoj en du aŭ pluraj lingvoj

1. Kiam traktato estas aŭtentikigita en du aŭ pluraj lingvoj, la teksto estas egale aŭtoritata en ĉiu lingvo, krom se la traktato preskribas aŭ la partioj interkonsentas, ke en kazo de diverĝo, determinita teksto superu.

2. Traduko de la traktato en lingvo alia ol unu de tiuj en kiuj la traktato estis aŭtentikigita, estu konsiderata aŭtentika teksto nur se la traktato tiel preskribas aŭ la partioj tiel interkonsentas.

3. La terminoj de la traktato estas supozataj havi la saman signifon en ĉiu aŭtentika teksto. Krom en la kazo menciita en paragrafo 1, kiam komparo de la tekstoj malkaŝas diferencon de signifo, kiun la apliko de artikoloj 27 kaj 28 ne forigas, signifo estu adoptita, kiu kiom eble akordigas la tekstojn.

SEKCIO 4: TRAKTATOJ KAJ TRIAJ ŜTATOJ

Artikolo 30.

Generala regulo pri triaj ŝtatoj

Traktato kreas nek devojn, nek rajtojn por tria ŝtato sen ties konsento.

Artikolo 31.

Traktatoj, kiuj preskribas devojn por triaj ŝtatoj

Devo ekestas por ŝtato el preskribo de traktato, en kiu ĝi ne estas partio, se la partioj intencas krei la devon pere de la preskribo kaj se la tria ŝtato akceptis eksplacite tiun devon.

Artikolo 32.

Traktatoj, kiuj preskribas rajtojn por triaj ŝtatoj

1. Rajto estiĝas por ŝtato el preskribo de traktato, en kiu ĝi ne estas partio, se la partioj intencas, pere de tiu preskribo, doni tiun rajton aŭ al la koncerna ŝtato aŭ la grupo de ŝtatoj, al kiu ĝi apartenas, aŭ al ĉiuj ŝtatoj, kaj se tiu ŝtato konsentas. Ĝia konsento estu supozata ĝis la malo ne estas indikita.

2. Ŝtato, kiu uzas rajton laŭ paragrafo 1, devas observi la kondiĉojn por ĝia uzado, preskribitajn en la traktato aŭ establitajn konforme al ĉi tiu.

Artikolo 33.

Nuligo aŭ modifo de devoj aŭ rajtoj de triaj ŝtatoj

1. Kiam devo estiĝis por tria ŝtato konforme al artikolo 31, la devo estas nuligebla aŭ modifebla nur kun la konsento de la partioj en la traktato kaj de la tria ŝtato, krom se estas establite, ke ili alimaniere kontraktis.

2. Kiam rajto estiĝis por tria ŝtato konforme al artikolo 32, la rajto ne estas nuligebla aŭ modifebla sen la konsento de la tria ŝtato.

Artikolo 34.

Reguloj en traktato fariĝantaj devigaj per internacia kutimo

Nenio en artikoloj de 30 ĝis 33 malebligas, ke regulo difinita en traktato devigiĝu por tria ŝtato kiel kutima regulo de internacia juro.

Parto IV.

AMENDO KAJ MODIFO DE TRAKTATOJ

Artikolo 35.

Generala regulo pri la amendo de traktatoj

Traktato povas esti amendita per konsento inter la partioj. La reguloj preskribitaj en Parto II. aplikiĝas al tia interkonsento ĝis la limo, kie la traktato alimaniere preskribas.

Artikolo 36.

Amendo de multflankaj traktatoj

1. Krom se la traktato alimaniere preskribas, la amendo de multflankaj traktatoj estu regata de la sekvantaj paragrafoj.

2. Ĉiu propono amendi multflankan traktaton en la rilatoj inter ĉiuj partioj estas sciigenda al ĉiuj partioj, el kiuj ĉiu havas la rajton partopreni en:

a) La decido, kio estas farenda pri tiu propono:

b) La intertraktado pri la kontrakto de ĉiu interkonsento celanta la amendon de la traktato.

3. Ĉiu ŝtato, kiu rajtas fariĝi partio en la traktato, rajtas ankaŭ fariĝi partio en la traktato amendita.

4. La amendata kontrakto ne ligas tiun ŝtaton jam partion en la baza traktato, kiu ne fariĝis partio en la amendanta kontrakto; paragrafo 4 b) de artikolo 26, aplikiĝas rilate tian ŝtaton.

5. Ĉiu ŝtato, kiu fariĝis partio en la traktato post la ekefiko de la amendanta kontrakto, se tiu ŝtato ne esprimis alian intencon, estos konsiderata:

a) Partio en la traktato amendita;

b) Partio en la neamendita traktato rilate ĉiun partion en la traktato ne ligitan de la amendanta kontrakto.

Artikolo 37.

Kontraktoj por la modifo de multflankaj traktatoj en la rilatoj inter nur kelkaj partioj

1. Du aŭ pluraj el la partioj en multflanka traktato rajtas fari kontrakton por modifi la traktaton nur inter si:

a) Se la ebleco de tia modifo estas preskribita en la traktato; aŭ

b) Se la koncerna modifo:

I. ne tuŝas koncerne la aliajn partiojn la ĝuadon de iliaj rajtoj devenantaj el la traktato aŭ la plenumadon de iliaj devoj;

II. ne rilatas al preskribo, malfortigo, kiu estas malakorda kun la efektiva plenumo de la celo kaj intenco de la traktato en ĝia tuteco; kaj

III. ne estas malpermesita de la traktato.

2. Krom se, en kazo regata de paragrafo 1 a), la traktato alimaniere preskribas, la koncernaj partioj devas sciigi la aliajn partiojn pri sia intenco fari la kontrakton kaj pri la planitaj modifoj al la traktato, por kiu la modifo estas intencita.

Artikolo 38.

Modifo de traktatoj por posta praktiko

Traktato povas esti modifita per posta praktiko, rilate la aplikadon de la traktato, kiu establas la interkonsenton de la partioj modifi ĝiajn preskribojn.

(Daŭrigota)

(Tradukis: Amb. Ralph Harry)

Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ)

(ALIGINTA FAKA ORGANIZO DE UEA)

estas fondita en 1957, dum 42-a Universala Kongreso de Esperanto, en Marseille (Francujo).

El la decidoj de la fondkunveno:

1. rekomendi al ĉiuj juristoj-esperantistoj aliĝi kiel individuaj membroj al UEA kaj fariĝi fakdelegitoj pri juro;
2. aliĝi la Asocion, se eble kiel sekcion, al „International Law Association”, kaj rekomendi al ĉiuj juristoj-esperantistoj aliĝi kiel individuaj membroj al naciaj sekcioj de tiu internacia asocio de juristoj.

La celo de IEAJ estas:

- a) disvastigi la Internacian Lingvon inter la juristoj kaj antaŭenigi ĝian praktikan uzadon en la internaciaj rilatoj de juristoj;
- b) helpi la utiligon de la Internacia Lingvo por fakaj, profesiaj kaj sciencaj celoj de la membroj.

Ordinara membro povas esti akceptita ĉiu persono, kiu diplomiĝis ĉe Jura Fakultato aŭ samranga Alta Lernejo, kaj kiu parolas la Internacian Lingvon. Kiel eksterordinara membro povas esti akceptita ĉiu esperantisto, kiu estas studento de juro, aŭ kiu laboras en juĝejo, tribunalo, advokata aŭ notaria kancelario, aŭ en simila jura institucio. Kiel subtenanta membro povas esti akceptita ĉiu fizika aŭ jura persono, kiu per siaj kontribuoj deziras helpi la Asocion.

Aliĝojn akceptas Sekretarioj-kasistoj je la subaj adresoj.

Kotizo estas 2 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro jare. Ĝi inkluzivas la abonon de la oficiala organo.

Organo fondita en 1966, dum 51-a Universala Kongreso de Esperanto, en Budapeŝto (Hungarujo), de la Asocio estas „Internacia Jura Revuo”.

Abonprezo por nemembroj: 1 usona dolaro aŭ egalvaloro jare.

Plenumkomitato por la laborjaro 1966—1969:

Prezidanto: Prof. D-ro Ivo Lapenna, profesoro pri Kompara Soveta kaj Orienteŭropa Juro en The London School of Economics and Political Science, Universitato de London, (Brit.).

Vicprezidantoj: **Roman Sakowicz**, advokato, Nowa Sól (Pollando)

Erwin Stolpe, juĝisto, Berlin (Okc. Germanujo).

Sekretarioj-kasistoj: **D-ro Luwig Röhl**, notario, Dillingerstr. 7. D-887 Günzburg (Germana Federacia Respubliko);

D-ro Lajos Márton, prokuroro, Hajnóczy utca 2, Budapeŝto, XII. (Hungarujo).

Publikaj Kunvenoj de IEAJ, al kiuj estas invitataj ĉiuj membroj de la Asocio, kaj kongresurbaj juristoj-neesperantistoj por pritrakti komparjuran temon, okaze de la Universalaj Kongresoj:

Mainz (Germanujo), 1958: Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj;

Bruxelles (Belgujo), 1960: La pozicio de advokato en diversaj landoj;

Harrogate (Britujo), 1961: La respondeco de la aŭtoposedantoj;

Kopenhavn (Danlando), 1962: Evoluoj en la Soveta Juro (1958—1962);

Den Haag (Nederlando), 1964: La koncepto de proprieto kaj ĝiaj ĉefaj limigoj en diversaj landoj;

Budapeŝto (Hungarujo), 1966: La principo de egalrajteco de seksoj en la familia juro de diversaj landoj;

Rotterdam (Nederlando), 1967: La ŝtataneco laŭ la juro de diversaj landoj.

Madrid (Hispanujo), 1968: La rajto de kunveno kaj organiziĝo laŭ la juro de diversaj landoj.